

HORIZONTO

III-a JARO N-o 15 (3)
MAJO - JUNIO 1978

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



SAN JUAN DE LA PEÑA
Klostro interne de la roko

KREDO KAJ VERO

INTERVJUO KUN PROF. D-RO IVO LAPENNA

KUNIGU PROGRESON KAJ TRADICION

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino
Inés Gastón
Redakta Komitato
Salvador Gumá
Juan Régulo
Jean Thierry
Red. kaj Adm.
Inés Gastón
P.º Marina Moreno, 35
Telf. (976) 22.05.21
Zaragoza-1 (Hispanujo)
Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj
Dumonata revuo
Presita en Zaragoza
ĉe "Tipografía C. Boloix"
str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8
Leĝa Depono Z-133-76
N.º 3 - Majo - Junio 1978

E N H A V O

ANTAŬ LA IV.^a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTOMOVADO (I. G.)
SALUTO (M. Sancho-Izquierdo)
SALUTO (Armando Abadía)
INTERVJUO KUN PROF. D-RO IVO LAPENNA (Intervjuinto: André Bourdeaux)
KUNIGU PROGRESON KAJ TRADICION (Inés Gastón)
«REGUSTIGO» (Roger Bernard)
PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ (Komentas: Ivo Lapenna)
ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED) (Redaktas: Ivo Lapenna)
MALLONGE
BELETRO
La Amoroj de P. de Ronsardo al Helena (trad. G. Waringhien)
Grandkanono (trad. Eva kaj Bernard Golden)
Pripensinda Rakonto (trad. F. Liebl)
SAN JUAN DE LA PEÑA (G. Mora i Arana)
TRA LA ESPERANTO-GAZETARO (Raportas: Jean Thierry)
KION VI NE LEGOS ALILOKE
Letero de Prof. Ivo Lapenna
LIBROJ SUB LA LUPEO Recenzas: (Salvador Gumá, H. Mü., R. S.)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo. Pĉk. Zaragoza 00428398 (Jarabono 500 ptoj.), aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:
Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.
Britujo:
Geoffrey King, 14 Elmdale Road, LONDON N13 4UL. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.
Danlando:
Peter Zacho, Nørregardsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, DK-2700. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.
Finlando:
Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 KUOPIO 10, Pĉk KU 152801-5. Jarabono: 38,— F. Mk.
Francujo:
André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.
FR Germanujo:
Heinrich Müller, Mommsenstrasse 5, D-3000 HANNOVER 1. Pĉk. Hannover 120 854-301. Jarabono: 24,— DM.
Grekujo:
K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 380,— Grekaj Drakmoj.
Israelo:
Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, PETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoar, 4-45854-8. Jarabono: 84 izr. liroj.
Kanado:
Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.
Luksemburgo:
Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L OLM. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Epargne de l'Etat). Jarabono: 380, luksemburgaj frankoj.
Rumanujo:
Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

PLEJ GRAVAJ VERKOJ

Eldonejo: PLAZA & JANES, S. A.
ESPLUGAS DE LLOBREGAT
(Barcelona - Hispanujo)

ANTAŬ LA IV-a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Kiam mi preparas tiun ĉi numeron de «Horizonto», plejparte dediĉita al la IV.^a Konferenco kaj ties gastiga regiono, konstante venas al mia penso la nomo de Prof. Delfi Dalmau, kun kiu nin ligis vera amikeco. La afableco kaj homaj kvalitoj de tiu saĝa homo, forĝinto de tuta generacio de esperantistoj, faris de li la konsilanton de ĉiuj respektata. En malfacilaj momentoj — interne de la movado — por nia laboro, ĉiam ni trovis lian konsilon kaj lian helpon.

Tial, mi dediĉas al lia memoro mian laboron en la organizado de la IV.^a Internacia Konferenco de NEM, kaj kiel eta omaĝo mi transkribas verketon lian.

I. G.

KREDO KAJ VERO

Iam, en urbeto kie mi loĝis kaj laboradis kiel instruisto pri lingvoj, mi faris paroladon titolitan «Eleganteco». Komprenoble, mi celis pritrakti elegantecon lingvan. Do, mi antaŭvidis malgrandan ĉeestantaron. Mi trompiĝis, mi havis la surprizon vidi, ke la salono pleniĝis, ke ekzistis granda, amasa interesiĝo por aŭdi min pri tiu temo. Efektive, profesiuloj pri elegantaj vestaĵoj, sinjorinoj, fraŭlinoj kaj viroj, kiuj pretendis aŭ deziris esti elegantaj venis, krom miaj konatoj, kiuj certe supozis, ke mi parolos pri lingva eleganteco. Ni ĉiam estas pli-malpli naivaj; mi supozis, ke mi estas sufiĉe konata de la tuta urbanaro, ke ĉiuj komprenos, ke mi priparolos lingvan temon.

Mi esperas, ke nun la fakto ke ĉi-tiu verkaĵo aperas en libro pri Esperanto, evitos eraron de legantoj pensi, ke sub la supra titolo oni povas pritrakti nur religian temon. Ĉu mi ankaŭ ĉi-foje estas naiva?

Ĉiuj lernantoj de Esperanto kaj multaj instruantoj kredas, ke nia internacia lingvo estas tute logika, ekzakte logika, ke la Gramatiko kaj la Vortaro, t.e. la 16 reguloj kaj la vortelemantoj solvas la problemon tiagrade, ke ĉiu, kiu bone lernis, formos la lingvaĵon, la esprimadon en Esperanto tiamaniere, ke la Zamenhofa lingvo rezultos la sama el ĉies lernado. Tion eble kredas eĉ instruistoj de Esperanto kaj esperantistoj uzantaj la lingvon jam dum longe. Ordinare, ĉiuj opinias, ke la Zamenhofaj esprimoj estas neevitebla kaj preciza rezulto, simpla aplikado de la elementoj de la lingvo.

Nu, estas tempo konsciiĝi, ke tia kredo estas iluzio. En la ĉapitro sub la titolo «Justeco» k.a. mi provas komprenigi, ke eĉ se Zamenhof lingvosciencie estus elektinta proksimume la samajn elementojn de la lingvo, sed ne estus poeto, artisto pri kreado de la lingvaĵo, de la esprimoj, de la aplikado de tiuj elementoj, gravega manko minacus la lingvon, ĝian funkciadon, ĝian ekziston.

Ĉiuj lingvoj estas kreitaj de siaj famaj oratoroj kaj literaturistoj, kaj de ne konataj popolanoj, kiuj posedis la arton, la lingvan intuicion, malgraŭ kiu ili kreadis la esprimojn. Per la samaj elementoj, la homoj kiuj ne posedas tian kapablon ne sukcesas, nur fuŝas. Vero estas, ke Esperanto konsistas ĉefe el la de Zamenhof kaj aliaj artistoj kreita esprimaro, lingvaĵo, lingvo.

La lingvoelementoj ne estas lingvo. Tion devas profunde konscii la instruantoj de Esperanto. Esperanton scipovas ne tiuj, kiuj konas nur ĝiajn *elementojn*, sed tiuj, kiuj legante, aŭdante, imitante, alproprigis al si la *lingvon* kreitan de la poeto Zamenhof kaj ceteraj poetoj de Esperanto. La bonaj instruantoj lernigas la lingvon, la esprimojn, la frazojn, elokventajn dirajojn: «fartu bone!», «ĝis revido», «kara amiko», «antaŭen!»; kaj ĉiuj bonaj esprimoj kaj tekstoj kaj paroladoj estas la vivanta Esperanto, kiun ne povas krei, sed nur lerni — antaŭ, samtempe aŭ post la lernado de la vortelemantoj — la novaj esperantistoj kaj ĉiuj, kiuj ne estas lingvoartistoj.

Multe legi kaj aŭdi bonan Esperanton de la Majstro kaj de jam multaj bonaj verkistoj kaj oratoroj, jen plej efika vojo al posedo de tiu lingvo jam klasika kaj moderna, kreita, kreata kaj kreota de popolo kaj poetoj, laŭ evoluado de ĉiu natura lingvo. Vere, Esperanto estas pli natura ol la esperantistoj mem kredas.

El Dialekto Dialektiko
D. Dalmau

Saluto

Kiel Prezidanto de la IV.^a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, mi kore salutas vin; al kiuj venos al nia aragona urbo en la Pirenea montaro por partopreni en nia laboro.

Aragón, kies forta personeco estas bone konata, ĉiam estis —eble pro tio— aperta al ĉiaj fluoj alvenantaj, ĉefe tra tiu ĉi Pireneo, kiu pli kunigas ol disigas. Lulilo de civitanaj liberecoj, Aragón sentis la liberecon kiel «suno brilanta» —en frazo de l' poeto— kiu grupigis «sur la bordoj de l' Ebro» siajn gentojn kvazaŭ «formante unu nuran korpon», ĉar, krom tiu libereco, ĝi sentis la fratecon, kaj ne nur inter siaj gentoj, sed ankaŭ kun tiuj alilandaj kun kiuj sin sentis ligita per komuna idealo.

Tial, kiam la forta alvoko de tiu frateco surbaze de neŭtrala internacia lingvo alvenis ĝis tiu ĉi tero, oni donis tiun nomon al Societo, kiun viro —chessa pro sia deveno kaj forta persistemo— fondis antaŭ 70 jaroj, kaj kiu daŭre kaj vigle vivas.

Kiel ĝia Prezidanto, mi estas Prezidanto de O.K.K. Tial, mi iluzie salutas ne nur al la partoprenontoj en la Konferenco, kiujn mi atendas etenditaj la brakoj por doni al ili fratan ĉirkaŭpremon, sed ankaŭ al tiuj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povos ĉeesti en Jaca, sed kiuj spirite akompanos nin kaj konstante nin kuraĝigas por daŭrigi en nia laboro «sub la sankta signo de l' Espero», kiu —malgraŭ ĉio— ne mortis nek mortos en ni, kun la celo firmigi la Pacon kaj la Amon en ĉi tiu hodiaŭa turmentita Homaro.

Miguel Sancho Izquierdo
Prezidanto de O.K.K.

Saluto

Koran akcepton, Sinjoroj Konferencanoj, en tiu ĉi malnova kaj nobla urbo, fame konata pro sia bonkoreco, levinta antaŭlonge la flagon de paco, amikeco kaj amo.

La moderna mondo estas kriza mondo. Ni, samtempuloj de la aŭtomateco, de l' nuklea energio, de l' spackonkero, atestantoj de sciencaj venkoj ĉiutagaj, ni tamen ĉeestas la ne negeblan fakton nur ŝajne ne eviteblan, ke senescepte tiuj konkeroj paradokse kunportas la malhumanigon de l' homa vivo.

Kia espero restas al ni por restarigi tiun ekvilibron aspiratan de milionoj da personoj? Eble nur la interkompreniĝo.

Por ami nin reciproke estas necese nin koni. Havi rilatojn. Interparoli. Kaj kio estas pli grava: Interkompreniĝi. Paroli komunan lingvon.

En ĉiu homo troviĝas la homo. La internaciaj rilatoj pravas al ni ĉiutage, ke la diferenco inter la homoj ne estas fundamenta, kaj ke en la penso kaj koro de ĉiu homo estas facile troveblaj la pensoj kaj koroj de la aliaj homoj. Kaj ke ili tre facile kunigas sin ĉiufoje kiam ili renkontiĝas en sama feliĉeco aŭ en komuna malfeliĉeco.

La Homaro estas kolekto da individuoj kuniĝintaj en malsamajn grupojn. Kaj ĉiu el ni apartenas samtempe al pluraj el tiuj grupoj: nacioj, familioj, religioj, profesioj, politikoj... kiuj samtempe disigas kaj kunigas nin en senliman simbiozon socian, per reciproka servado.

Jaca travivas ĉiujare kun iluzio la Pirenean Folkloran Festivalon, kiu kunvenigas pli ol du mil partoprenantojn el 30 landoj. Kaj la vojoj al la paco, la kunvivado kaj la interkompreniĝo trovas nur la baron de la lingvoj, kiuj pro grandnombreco ne povas esti kompreneblaj.

Tial Jaca scias ĝuste la bezonon de komuna lingvo. Tial Jaca akceptas kun speciala amemo ĉi tiun Esperantistan Kunvenon. Kun amo kaj dankemo. Kaj kun espero, ĉar Jaca scias ke se la moderna mondo bezonas rehumaniĝi, ĝi devas havi rimedon, kiu, simile al muziko, ebligu al la homa spirito diskonigi sin, per lingvo senpera kaj tutmonde komprenebla.

Feliĉan venon, do, en ĉi tiun urbon, kiu komprenas vian iluzion kaj kun vi dividas ĝin.

Armando Abadía
Urbestro de Jaca



Intervjuinto: André Bourdeaux

Intervjuo kun Prof. D-ro. Ivo Lapenna, okaze de la 50-Jara Jubileo de lia Esperantisteco

A. B.: Prof. Lapenna, 1978 estas la 50-a datreveno de via dediĉo al Esperanto kaj al ĝia socia portanto: la Internacia Esperanto-komunaĵo. Rigardante malantaŭ vin, pri kiuj el viaj multnombraj atingaĝoj vi speciale fieras?

I. L.: Ne temas tiom pri fierado, eĉ ne en la flata unua senco de la difino en PIV, kion mi pri sento de kontento pro mia kontribuo al unu el la plej rimarkindaj pozitivaj fenomenoj en la socia kaj kultura historio de la mondo, al la afero de la Internacia Lingvo, kiun mi rigardas decide grava elemento inter la faktoroj puŝantaj la homaron al integriĝo sur pli alta ŝtupo de unueco en diverseco. Tiu fundamenta ideo inspiris mian tutan laboron ekde 1928, kiam mi ellernis Esperanton, kaj ĝi restos mia gvidprincipo dum la fortoj permesos al mi aktivi. Ĝi estas detale prilaborita en *Retoriko*, *Elektiitaj Paroladoj*, *Esperanto en Perspektivo* kaj *Hamburgo en Retrospektivo*. Krome, en multaj artikoloj kaj prelegoj.

Tamen, responde al via konkreta demando, mi opinias, ke jenaj atingoj meritas mencion:

Fondo kaj gvidado, kune kun vere kleraj kaj sindonaj kunlaborantoj, de Studenta (poste Akademia) Esperanto-Klubo (AEK) en Zagreb. Ĝi funkciis de 1929 ĝis la 10-a de aprilo 1941, kiam la naziaj trupoj, formale helpataj de la «ustaŝoj» (kroataj nazioj), okupis Zagreb. En nuraj 12 jaroj de sia agado en tre malfavoraj kondiĉoj de duonfascista diktaturo, AEK sukcesis ne nur rapide kaj konstante progresi, sed ankaŭ regeneri la tutan Jugoslavian Esperanto-Movadon. Jen nur kelkaj el la agadoj: informaj artikoloj en la plej bonaj taggazetoj kaj periodaĵoj; prelegoj en fakultatoj, popola universitato kaj ĉiumonate per radio; ĉiusemajnaj anoncoj en gazetoj; ekspozicioj, flugfolioj kaj afiŝoj en miloj da ekzempleroj; tri eldonoj de mia lernolibro *Esperanto u Deset Lekcija* (Esperanto en Dek Lecionoj) kaj ĉ. 70 kursoj sur diversaj niveloj, parte ankaŭ ekster Zagreb; unuarangaj semajnaj kunvenoj kun altnivelaj kulturaj programoj, ekskursoj, ĉiujara granda balo ktp. Paralele kun la multiĝintaj agadoj kreskis la nombro de la membroj: en 1929 AEK havis 3 membrojn, en 1941 la nombro estis ĉ. 160, ne kalkulante tiujn, kiuj pasis tra la Klubo kiel gestudentoj kaj poste profesie eklaboris kaj ekagis por Esperanto en aliaj urboj; en 1929 en Jugoslavio ekzistis nur 3-4 malgrandaj Esperanto-grupoj iel vivetantaj, en 1941 efike aktivis 38 societoj kun 1.247 pagantaj membroj en la kadro de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL), do sen la membroj de la

laboristaj Esperanto-societoj, kun kiuj, cetere, JEL intime kunlaboris. Ĉ. 10.000 personoj bone parolis la lingvon. Nur en Zagreb funkciis tri grandaj societoj (AEK, Esperanto-Societo, Laborista Esperanto-Societo), ĉiu kun propraj sekretariejo, biblioteko, leĝejo, ĉiutaga deĵorado kaj aliaj aktivadoj, aldone al la luitaj salonoj por la ĉiusemajnaj kunvenoj kaj kursoj. Krome, ekzistis du malpli grandaj fakaj grupoj kaj sporta futbala Esperanto-Klubo, verŝajne la sola en la historio de la Esperanto-Movado. Entute, nur en Zagreb — ĉu en la societoj apartenantaj al JEL aŭ ekster ĝi — antaŭ la nazia invado estis iom malpli ol 1.000 organizitaj esperantistoj, kio konsiderinde superas la nombron de membroj de tutaj tiamaj aŭ nunaj landaj asocioj.

Laborante en AEK mi ne nur donis kaj instruis, sed samtempe ankaŭ lernis multon. Tie kristaliĝis la baza koncepto, ke por rapidigi la progreson de nia afero nepre necesas agi paralele kaj samtempe en tri direktoj: informado, instruado kaj praktika aplikado de la lingvo. La spertojn akiritajn en AEK mi poste aplikis al la laboro en tuta Jugoslavio, sur la Balkana Duoninsulo kaj, fine, en mondaj kadroj.

Alia rimarkinda sukceso estis la Jugoslavia Esperanto-Kongreso en la Kroata Parlamentejo (*Sabornica*) en Zagreb (1937) kun ĉ. 500 partoprenantoj. Estis elektita la nova estraro de JEL. Ĝi konsistis nur el membroj de AEK kaj mi mem fariĝis prezidanto. Samtempe mi fariĝis komitatano kaj en 1938 estrarano de la tiama Internacia Esperanto-Ligo (IEL). Tio kondukis min al la internacia Esperanto-Movado kaj ebligis al mi doni efikan helpon al IEL en la tiama krizo kaj, post la milito, firman apogon al kunfandiĝo inter IEL kaj la Geneva UEA, nome kreon de unueca UEA en 1948.

El la atingoj sur internacia nivelo mi inklinas speciale mencii la fondon de ISU, Belartaj Konkursoj kaj Oratoraj Konkursoj en 1949; la organizon de informado kaj de la Kongresa Gazetara Servo (ekde 1950); la fondon de CED en 1952 kaj ĝian laboron ĝis la fino de 1974; la establaron de konsultaj rilatoj kun Unesko kaj la Rezolucion de tiu organizaĵo en 1954; la ellaboron de la Principaro de Frostavallen (1956) kaj la efikan plenumadon de tiu Principaro; la organizon de la Zamenhof-Jaro en 1959 kaj la decidon de la tiama Plenuma Komitato de Unesko deklari D-ron Zamenhof Granda Personeco de la Homaro; la organizon de la granda kampanjo en 1955, kiu rezultigis la multmilionan proponon al UN en 1966; la ellaboron de la Unua kaj Dua Bazaj Laborprogramoj (1955 kaj 1962) kaj la realigon de iliaj celoj; la publikigo de la preskaŭ 900-paĝa *Esperanto en Perspektivo* en 1974, kaj la eldonon de *Hamburgo en Retrospektivo* kiel necesan kompletigon — por mi tre dolorigan — de *Esperanto en Perspektivo* en 1975 kaj 1977 (dua eldono). Rezulte de tiuj kaj multaj aliaj agadoj — ĉiuj kunligitaj kaj interdependaj, fakte nur partetoj de la menciitaj unueca baza koncepto — UEA konsiderinde fortikiĝis kaj intelekte, kaj nombre, kaj finance, kio estas ĝenerale konata.

Tri punktoj ŝajnas al mi emfazindaj en ligo kun la respondo al via demando. Unue, dum tiu longa periodo mi havis la okazon kunlabori kun tre multaj aktivuloj ekde AEK ĝis UEA. Sen ilia apogo kaj aktiva helpo neniu sukcesoj estus povinta realiĝi. Ili ĉiuj — inkluzive tiujn, kiuj devojiĝis de la iam komuna idealo kaj eĉ forgesis reciproke personajn lojalecojn — estas dankindaj. Due, por povi sukcese agadi en monda organizaĵo, unuopulo devas antaŭ ĉio pruvi siajn kapablojn sur loka nivelo, poste sur landa kaj nur fine sur internacia, tutmonda. Certe ne tiuj etapoj de spertiĝo, kiel ofte okazis kaj plu okazas en la Esperanto-Movado. Trie, se nenio alia, do la pozitivaj rezultoj atingitaj kaj en AEK, kaj en JEL, kaj en UEA klare montras, ke la aplikitaj agadmetodoj estis ĝustaj kaj celtrafaj.

A. B.: *En tiuj 50 jaroj okazis eventoj plaĉaj aŭ malplaĉaj, el kiuj ŝprucis anekdotoj. Ĉu vi povus elvoki kelkajn el la plej signifaj?*

I. L.: Vi pravas: estis multaj plaĉaj, eĉ tre plaĉaj eventoj, sed estis ankaŭ sufiĉe multaj malagrablaj situacioj. Abundas ĉiaspecaj anekdotoj, kiuj plektiĝis ĉirkaŭ mia nomo: veraj, duonveraj, aŭ tute elpensitaj, ofte tre amuzaj, aliaj malpli. Tro da spaco estus necesa por rakonti iom detale eĉ nur 1-2 el ili, ekzemple pri la diversaj vere amuzaj «aventuroj» dum mia granda prelegvojaĝo en 1949-1951, aŭ dum la Konferenco de Unesko en Montevideo, aŭ okaze de kunsidoj de la Estraro de UEA. Ofte ni spritis kaj ridis profunde en la nokto, kio multe helpis al refreŝiĝo de la fortoj. Dum la planita aparta renkontiĝo en Jaca okaze de tiu 50-jara datreveno mi volonte iom spicos la seriozajn spertojn per kelkaj anekdotoj.

A. B.: *Simpla batalanto, organizanto, oratoro, doktrinanto, beletristo kaj membro de la Akademio, «semante konstante», vi fekundis tiun nian komunaĵon provante plialtigi kaj la moralan kaj la intelektan nivelon de la membroj de nia komunaĵo. Ĉu entute vi opinias, ke vi sukcesis?*

I. L.: Ne, mi ne sukcesis, sed mi neniel perdas la esperon, ke la koncepto, laŭ kiu mi agis ekde la studentaj jaroj kaj la konkretaj pozitivaj rezultoj de tiu agado, iam re-fariĝos la ĉefa instrumento por la fina sukcesigo de nia afero. Ni estu tute sinceraj al ni mem kaj aperte rekonu, ke la genia verko de Zamenhof ekde la komenco estis ma-

kulata de sennombraj intrigoj, envioj, subfosadoj, sekteco kaj primitiveco de tro multaj, kutime la plej laŭtaj, en la Esperanto-Movado mem. Tio forpelis konsiderindan nombron da elstaraj kulturaj agantoj, paralizis la laboron de aliaj kaj intelekte kompromitis ne nur la Esperanto-Movadon, sed eĉ la lingvon mem. Guste tio grandparte eksplikas, kvankam neniel pravigas, la sintenon de Prof. Blinkenberg en Montevideo (v. pri tio p-ojn 769-773 en *EeP*) kaj de miloj da similaj blinkenbergoj ĉie tra la mondo. Mi esperis, ke per sistema laŭplana aktivado sur alta kultura nivelo, kontraŭbatalante samtempe la primitivaĵojn interne de la Esperanto-Movado, estos eble sekigi por ĉiam tiun marĉon de senideeco kaj primitiveco kiel la ĉefan obstaklon al vere impona plua progresado de nia afero. Antaŭ la Londona Kongreso en 1971 mi fidis, ke la marĉo estas plene sekigita kaj anstataŭe konstruita solida betona fundamento, sur kiu la pli juna generacio, helpata per konsiloj de la pli aĝa, facile povos plu konstruadi kaj en la daŭro de 1-2 generacioj definitive havigi al Esperanto la celatan pozicion de la lingvo de internaciaj rilatoj sur ĉiuj niveloj. La fido ŝanceliĝis en 1971; en 1974 ĝi montriĝis nura iluzio. Tio, kion mi erare kredis solida betona fundamento surloke de la sekigita marĉo, montriĝis nur maldika cementa tavolo super la marĉo. Kiam sub la premo de senprecedencaj politikaj konspiroj ligitaj al paralelaj ĉiaspecaj intrigoj kaj personaj atakoj la tavolo krake ekkrevis, tra la fendoj kaj truoj ĉie elŝprucis la subpremita marĉo de primitiveco kaj abunde disverŝiĝis sur la tavolon. Tion — nur tion, certe ne la multnombrajn unuopajn atingojn — mi rigardas kiel malsukceson, eĉ kiel tragedion el vidpunkto de la interesoj de UEA kaj, pli ĝenerale, de la Esperanto-Movado. Komprenible, mi tion bedaŭras: oni ne donas 50 jarojn de sia vivo kaj ĉ. 50.000 efektivajn laborhorojn al iu nobla celo por fine vidi tian rezulton sen sento de aflikto. Des malpli, ke la tragedio ja estis evitebla, se la plej kleraj esperantistoj estus prenintaj senkompromisan starpunkton kaj dirintaj publike tion, kion ili diris al mi private. Aliflanke, restas la sereno de la konvinko, ke mi sukcese plenumis, kaj laŭ la ebleco plu plenumas, mian taskon en tuthomare grava afero. Tial, el pure persona vidpunkto — kvankam ne el tiu de la elementa digno de la Esperanto-Movado — la multjaraj sistemaj atakoj fare de diversaj individuoj kaj grupoj tute ne tuŝas min. Tiurilate mi staras sufiĉe alte kaj la ofendantoj devus iom pripensi la saĝon entenatan en la malnova proverbo: «Kiu supren kraĉaĵon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas» (Zamenhof).

A. B.: *Ĉu vi ne opinias, ke la oficiala agnosko de Esperanto rezultos nur el malrapida evoluo de la kolektiva mensostato?*

I. L.: Nepre jes: ĝi estas la sola vojo, kiu kondukas al ĝeneraligo de la lingvouzo, sed oni devas ne forgesi, ke la spontanegan evoluon de tiu kolektiva mensostato rapidigas konsciaj tiucelaj agadoj, inkluzive akiron de sporadaj oficialaj agnoskoj, kia estis, ekzemple, la Rezolucio de Unesko de 1954.

A. B.: *Se tiel estas, ĉu vi ne sentas — kiel vi jam antaŭvidis per la kreado de LMLP kaj la Principaro de Frostavallen, kiun vi mem persone inspiris — ke nepras atingi duan gradon de informado, nome pledi por la kulturo kaj la humaneca internaciismo de Esperanto (Esperantismo estas humanismo*) sub la formo de artikoloj en monataj kaj semajnaj revuoj?*

(* Same kiel Jean Paul Sartre prezentis la ekzistencialismon kiel ian modernan humanismon diferencon de la helenlatina klasika.)

I. L.: Ankaŭ al tiu demando mi donas firman jesan respondon. Fakte, la humaneca internaciismo ligita al Esperanto ekde la unua tago sub la nomo «interna ideo», estis kaj restas la gvidideo, kiu inspiris milojn da aktivuloj kaj kaŭzis la transformigon de la lingvoprojekto de Zamenhof en vivantan lingvon de internacia lingvokomunaĵo. Ne temas pri tio, ĉu oni «volas» aŭ «ne volas» ligi al Esperanto humanecan internaciismon, kiel nescience kredas la partoprenantoj en la nuna diskuto pri tiu demando en du orienteŭropaj Esperanto-periodaĵoj. Temas pri tio, ke la humaneca internaciismo estas tiel objektivite ligita al la Internacia Lingvo, kiel la naciaj aŭ regionaj sentoj estas objektivite ligitaj al naciaj aŭ regionaj lingvoj (dialektoj). En tio konsistas la kvintesenco de la lingva problemo en la mondo. Se ne estus tiel, nome se lingvo ne havus tian idean aspekton, sed estus nura teknika rimedo de komunikado (kiel aŭtomobilo, telefono, radio, ktp.), nek la lingva problemo ekzistus, nek Esperanto estus iam ekestinta. Nia propono estas klara, simpla kaj konforma al la nuntempa socia realaĵo: regiona lingvo, laŭdezire, por regiona komunikado; nacia lingvo por komunikado interne de la nacio; internacia lingvo por internaciaj rilatoj.

Tial necesas intensigi la informadon aŭ, kiel vi diras, atingi duan gradon de informado, pledante eĉ pli aperte por Esperanto kiel lingva esprimo de humaneca internaciismo. Necesas tion fari ne nur per artikoloj, sed ankaŭ per ĉiuj aliaj modernaj rimedoj de informado. Pri tio ni detale diskutos en Jaca kaj mi estas certa, ke viaj profe-

siaj spertoj kiel ŝarĝito pri informado de la franca fervoja administracio, konsiderinde helpos al la atingo de utilaj decidoj.

A. B.: *Kia estas laŭ vi la perspektivo de Esperanto post la eventoj, kiuj pro konscienca motivo devigis vin delasi la UEA-n?*

I. L.: Provizore ankoraŭ tre malgrandaj, sed ne senesperaj. Aldone al *Horizonto*, NEM kaj ĝiaj internaciaj konferencoj, ekster UEA troviĝas pluraj organizaĵoj kaj centroj, kiuj efike plu laboras por Esperanto. En UEA mem ankoraŭ troviĝas sufiĉe multaj pozitivaj fortoj inter la ordinaraĵoj, delegitoj kaj ĉefdelegitoj. Ilia premo povus almenaŭ certagrade revenigi la Asocion al la laŭstatuta ĝishamburga linio. Niaflanke nenio malhelpas eĉ okazigon de malgranda internacia renkontiĝo de respondeculoj kun la celo serioze pritrakti la tre seriozan situacion, eble trovi eliron el la krizo kaj tiel ripari almenaŭ parte la malbonon faritan. Intertempe «ni fosu nian sulkon», kiel diris Th. Cart en ligo kun alia krizo.

“REĜUSTIGO”

En la cetere tre interesa verko de Adolf Holzhaus «Zamenhof; leteroj», enestas referenco, kiu estas por mi iom enigma.

Sur paĝo 231, n-ro 346, la aŭtoro citas poŝtkarton de Zamenhof al X. Bernard, kun la dato 10.6.1914, laŭ raporto de F. Banham el Aŭstralio. Nu, strange, la solan, la nuran kopion de tiu poŝtkarto, troviĝanta ankoraŭ nun en miaj manoj, mi sendis antaŭ proksimume deko da jaroj al R. Hauptenthal. Kiel do ĝi povas troviĝi en la manoj de S-ro F. Banham?

Mia patro, Xavier Bernard, esperantisto de 1907/1908, estis antaŭ la unua mondmilito sekretario de la grupo de Saint-Denis (apud Parizo). Tial li invitis D-ron Zamenhof viziti nian urbon, faman pro ĝia baziliko kun la tomboj de la francaj reĝoj, dum la U.K. okazonta en Aŭgusto 1914. D-ro Zamenhof tiam respondis al mia patro, ke li ne povas certigi sian ĉeeston, kaj tion decidis dum la kongreso mem. Oni scias, kial la U.K. 1914 ne okazis.

Pro profesiaj motivoj kaj transloĝiĝo mia patro, unu el tiuj multnombraj modestaj sed fidoplenaj esperantistoj, sen kiuj Esperanto estus de longe mortinta, ne aktivis plu, ĝis 1931, kiam mi mem komencis mian esperantistan karieron. Pri lia laboro (multaj antaŭmilitaj kursoj, kaj agado i.a. por la Internacia Konferenco «Esperanto en la moderna vivo» 1937) atestas la nekrologo verkita de P. Petit (Franca Esperantisto, Marto 1947). En 1937, F-ino Lydia Zamenhof almetis sian propran subskribon sur la karton senditan de ŝia patro al la mia.

Tiu «reĝustigo» verŝajne ne multe interesos la historiistojn. Mi opinias ĝin utila por la memoro de mia patro, al kiu mi ŝuldas mian esperantistecon.

Roger Bernard
14.2.1978

POSTMARKKOLEKTADO

Laŭ informoj ricevitaj, la ĉijara poŝtmarkkolektado prezentiĝas tiel sukcesa kiel pasintjare. Por ke ĝi daŭrigos en sama linio atentu bone al nova adreso de nia samideano, S-ro Peter ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 RØDOVRE, Danlando. Li daŭre akceptos viajn poŝtmarkojn.

Se vi aprobas la zamenhofan esperantismon, tute egale ĉu vi estas membro de kiu ajn Esperanto-organizaĵo aŭ ne, vi estas bonvena en la 4-a Internacia Konferenco de NEM.

KUNIGU PROGRESON KAJ TRADICION

*Jaca libera scias vivi
je la ombro de la monto Oroel*

Tiuj du versoj apartenas al la himno kiun oni kantas en Jaca (Ĥaka) la unuan vendredon de majo, kiam oni solene festas la faman datrevenon de heroaĵo rakontata de generacio al generacio, kaj kies realajn informojn ni povas trovi en la historio de Jaca, de la VIII-a jarcento, kiu tiom efikis por Aragón kaj kies rekonkero kulminis en Granada.

La faktoj okazis kaj la ĝestoj kantis kaj laŭdis ilin; sed laŭ la ĝestoj forgesiĝis de sia inspira historio, tio plej brila, plej intima el ĝi enradikiĝis en la memoro, en la animo de la popolo kaj tiel ĝi akiris novan vivon. Tiu ĉi «nova vivo» donis al la faktoj la bezonatan energion por pliekzisti; kaj, laŭlonge de la tempo, ili estis prilaboritaj eĉ de cirkonstancoj fremdaj al tiuj, kiuj okazigis ĝian propran naskiĝon.

Tra la mistero de la festo de la Unua Vendredo de Majo blovas ventoj de ektagiĝo de mezepoka historio. Aznar Galíndez aperas en la unua jardeko de la IX-a jarcento kiel guberniestro de la Aragona teritorio; tio estas; de la valoj de Hecho kaj Canfranc, investita kiel Grafo kaj agnoskita de Karlo la Granda.

Daŭraj ribeloj malkvietigis la muzulmanan popolon de la valo de la rivero Ebro dum la VIII-a jarcento. En la jaro 755 la gentoj de Pamplona rifuzas pagi tributon kaj ili estis perforte submetitaj. Ne estis facile por Aznar Galíndez defendi urbon kiel Jaca, ĉiam dezirata de la araboj, kaj la pravigo de sia titolo kiel grafo devis sin apogi en liaj plenumitaj servoj kaj en lia granda persona prestiĝo.

Fortan resonadon lasis en la popolo la batalo okazinta kie nuntempe staras la ermitejo dediĉita al Nia Sinjorino de la «Victoria» (de la Venko); same kiel la ĉefeco de Aznar super la jacetanoj por ilin brave movilizi kontraŭ la maŭroj. Granda sendube estis la ĝojo de la venkintoj; tiel granda ke ĝia rememoro konservas viva la feston ĝis la XIX-a jarcento, kiam la Romantikismo per sia «mito de la popolo poeta» laŭde kunligas historion kaj legendon kaj konservas por ni, — nuntempaj gentoj skeptikaj je tradicioj —, tiun daton intiman.

Tiel tekstas la antaŭparolo al la programo de solenaĵoj per kiuj la urbo Jaca festas la 1218-an datrevenon de la «Batalo de la Victoria», la Unuan Vendredon de Majo.

Pri tiu heroaĵo la tradicio diras al ni — proksimume — la jenon:

Kvar maŭraj reĝoj komandantaj 90.000 mahometanojn venis de Navarra por realmiliti Jaca-n. La Grafo Don Aznar decidis aliri al la malamiko, kun ĉiuj viroj kapablaj batali, kaj tiel, li sin ĵetis heroe en la maŭran militistaron, proksime de Jaca, ĉe la kuniĝo de la riveroj Gas kaj Aragón, malgraŭ ke la aznaranoj estis unu kontraŭ cent. Malgraŭ sia kuraĝego kaj heroeco, la kristanoj, pro maŭra amasego estis ekvenkataj; kurieroj iris en la urbon por informi pri la bataldisvolvigo. La virinoj de la urbo decidis alkuri al la batalkampo por morti kun siaj patroj, edzoj, fratoj, parencoj kaj amikoj, kaj amase sin direktis en la batalejon. La kristanoj rekuraĝiĝis pro la feliĉa helpo de tiu nekonata militistaro alvenanta; la maŭroj malkuraĝiĝis timante ke ĝi estas franca helpo... Samtempe nubegoj disŝiriĝis fulme, tondre, pluvege... la riveroj elbordiĝis kaj iliaj fluoj fortrenis la teruritajn maŭrojn.

Ci tiun okazintaĵon festas la Jacetanoj, ĉiujare, la unuan vendredon de majo, organizante paradon kiu rememorigas ĝin.

La parado eliras el la Urbodomo kaj defilas ĝis la ermitejo de la Venko-Virgulino, kie oni celebras la tradician meson por la mortintoj dum la batalo.

Tiuokaze, la urbo sin vestas per siaj plej belaj ornamaĵoj, la etoso estas ja festa, la sonoriloj gajigas ĝin. La popolo avida admiri la paradon lokas sin laŭlonge de la trairota vojo; ĉiuj deziras koni tiun, kiu reprezentos la Grafon Don Aznar, la Sindikon, la standardistinon... Intertempe alvenas la gekampanoj kaj la gemetiistoj vestite per siaj okulfrapaj kostumoj; la pompo de la militistoj kolorigas kaj eminentigas la feston. Ĉiuj defilas vige, kuraĝe; la kampanoj kaj la metiistoj pafadas per siaj pafiloj ŝarĝitaj per pulvo dum la devigaj ceremonioj en la avenuo, antaŭ la Katedralo, kaj finiĝas la parado antaŭ la Urbodomo, kie oni kantas la himnon de la Unua Vendredo de Majo; granda estas la entuziasmo, la popolo kantadas la himnon, kiu rememorigas la belajojn per kiuj Dio naturdotis tiun privilegian teron, la kuraĝon de ĝiaj loĝantoj... Tondraj aplaŭdoj finas la prezentadon... la festo daŭras en la koro de ĉiuj Jacetanoj, kiuj bone scias kunigi Progreson kun Tradicio.

Inés Gastón

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kelkaj vortoj pri la gravega verko de I. Dratwer

Mag. Isaj Dratwer, la aŭtoro de la gravega verko *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj*, skribis en sia letero de la 5-a de marto 1978 al la subskribinto:

«Kaj jen kuriozaĵo: institucio Hodler 68 rifuzis subvencii mian libron, sed donis al «Heroldo» subvencio de 1500 ned. guld. por aperigi tedan, longegan artikolon. Per tiu sumo mi povus sendi sepdek kvin ekzemplerojn al la esperantaj grupoj, aktivuloj en nepagipovaj landoj. Dua kuriozaĵo: la ĉina poŝto rifuzis akcepti la recenzezempleron de mia libro, senditan al «El Popola Ĉinio»... Do, estu tiel!»

Tamen, ne estu nur tiel, sed ni diru kelkajn vortojn pri tiu ĉi afero.

Jam antaŭ la ekfunkciigo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) la 1-an de januaro 1952, estis ellaborita detala plano por eldonado de dokumentoj. En la serio A/ estis antaŭvidita aparta sekcio VII kun la titolo «Opinioj pri Esperanto». Efektive, en ĝi aperis kelkaj dokumentoj, la lasta en 1971. Ankaŭ la libro *La Internacia Lingvo (Faktoj pri Esperanto)*, eldonita de CED en 1954, enhavis en ĉap. 2 plurajn opiniojn pri la valoro kaj signifo de Esperanto. Tamen, nekompareble pli grava estis la verko de I. Dratwer, kies unuan eldonon CED publikigis en 1970 kiel ekstersion grandan dokumenton en A/VII. Jam en la antaŭparolo de tiu eldono estis anoncote, ke la aŭtoro daŭrigos sian laboron kun la celo maksimume kompletigi la libron.

La unua eldono rapidege disvendigis. Intertempe, fine de 1974, aperis la monumenta, 844-paĝa *Esperanto en Perspektivo* (EeP). Diference de la menciita *La Internacia Lingvo*, EeP ne entenas ĉapitron kun opinioj pri Esperanto. Kiel ĉefredaktoro kaj ĉefa aŭtoro de EeP mi intence ellasis tiun ĉapitron, ĉar la tiama CED planis publikigi la duan eldonon de *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj*, laŭ interkonsento kun I. Dratwer. En la Antaŭparolo de EeP estas eksplicite dirite, ke «la manuskripto de la dua eldono, konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdatigita, estas jam preta»; ke «ĝi baldaŭ aperos kiel sekva eldonaĵo de CED»; ke «la tre valora verko de Mag. Dratwer devas esti rigardata ankaŭ kiel suplemento de tiu ĉi libro», t.e. de EeP.

Post la konataj eventoj de Hamburgo CED, kiu ĉesis plenumi la funkcion de la antaŭa CED, rifuzis la publikigon de la dua eldono de la verko en la kompletigita ampleksa formo, kun amaso da novaj citaĵoj — rezulto de multjara plej konscienca laboro de la aŭtoro. Tio devigis lin publikigi la verkon kiel propran eldonaĵon. Ĝi aperis en 1977 kaj la ĝisnunaj recenzoj, kiel oni povis atendi, estas tre favoraj.

Nun ni sciigas, ke la nova Estraro de la Institucio Hodler 68, siatempe iniciatita de f-ino M. Vermaas kaj fondita ĝuste por helpi tiaspecajn valorajn iniciatojn, rifuzis doni eĉ modestan subvencio al la aŭtoro, devige fariĝinta ankaŭ eldonisto. Tion oni povas nur plej profunde bedaŭri.

La 320-paĝa libro de Dratwer konsistas el du Enkondukoj, Antaŭparolo, Aldonoj kun rezolucioj de diversaj organizaĵoj aŭ instancoj kaj Persona Indekso. La centra parto de la libro — eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, filologoj, lingvistoj kaj aliaj — enhavas amason da konvene ordigita materialo. Ĉiu klera aktivulo en la Esperanto-Movado povos adekvate utiligi ĝin en diversaj kunteksto aŭ situacioj por atentigi pri la lingva problemoj kaj fortikigi la pozicion de la Internacia Lingvo kiel neŭtrale homa instrumento de lingva komunikado. Estas emfazinde ankoraŭfoje, ke sen *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj* la verko *Esperanto en Perspektivo* ne estas kompleta. Mi varme rekomendas la libron de Dratwer al ĉiuj, sed precipe al la multnombraj posedantoj de *Esperanto en Perspektivo*. La prezo de *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj* estas 30 ned. gld. aŭ egalvaloro kaj ĝi estas aĉetebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj aŭ ĉe la aŭtoro: Mag. Isaj Dratwer, Bat-Jam, P.O.B. 3396, Israelo.

I. L.

ESPLORO KAJ DOCUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 13

14. LA POLITIKO DE SEKRETAJ KUNVENOJ DAURIGATA

Laŭ informo ricevita el orienteŭropa lando, en marto 1978 okazis plia konfidenca Esperanto-kunveno, ĉi-foje en Poprad-Slovakio en la montaro Altaj Tatroj. El GDR ĉeestis D-ro Detlev Blanke, profesia partia funkciulo kaj unu el la tri estraranoj de la nuna CED; el CSSR partoprenis la prezidanto Vítek, la vicprezidanto Kočvara, la ĉefdelegito de UEA Ryznar «kaj iu junulino el Prago, kiu reprezentis la progreseman junularon, sed ne parolas Esperanton». El aliaj t.n. «popoldemokrataj landoj» ĉeestis «same politike fidindaj homoj». Eĉ el Soveta Unio «aperis iu eminentulo, kio ne okazas ofte, ĉar tiu lando ne donas facile permeson vojaĝi kaj viziti ian kunvenon».

La sendinto de la informo aldonis:

«Do, estas tre verŝajne, ke temis pri gravaj aferoj, sed neniu informis pri la konkludoj de la kunveno... La situacio ŝajnas al mi simila al la situacio antaŭ la hamburga kongreso. Ankaŭ tiam okazis sekretaj kunvenoj kaj ankaŭ tiam neniu sciis pri kio temas. Dum la UK en Varna povas okazi ia surprizo. Eble ili volas formi ian novan asocion nur por la popoldemokrataj landoj, aŭ tute ekregi UEA-n. Nu, ni vidos.»

Ni komentas:

Ne estas tute ĝusta la aserto, ke «neniu sciis pri kio temas», ĉar la redaktoro de tiu ĉi rubriko, dank' al sciigoj ricevita de sinceraj esperantistoj en diversaj orienteŭropaj landoj fine de 1973 kaj komence de 1974, prezentis la ĉefajn trajtojn de la politika konspiro en la artikolo «UEA en Danĝero de Malintegriĝo», publikigita en la aprila numero de *Esperanto*, 1974, kaj represita en la libro *Hamburgo en Retrospektivo*, dua eldono, sur p-oj 90-98.

La supozo, ke dum tiu ĉi lasta sekreta kunveno oni eble planis la fondon de nova asocio «nur por la popoldemokrataj landoj» aŭ «tute ekregi UEA-n» povas esti ĝusta, sed tio ne estas verŝajna. Por la partipolitikaj faktoroj ekster UEA kun siaj peonoj en UEA mem pleje konvenas ĝuste la nuna stato: libera partipolitika agado en la kadro de kvazaŭe partipolitike neŭtrala internacia asocio sen timo de kia ajn rezisto, aŭ eĉ nur milda reago, fare de la komitato kaj estraro de tiu asocio, aŭ de la organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Eĉ pli aperta ekrego de UEA (aŭ de kiu ajn alia jam ekregita neregistara internacia organizaĵo) — ekzemple transporto de la sidejo de UEA el Rotterdama en Sofion, Varsovion aŭ alian urbon en la blokado la Varsovia Pakto — signifus eraron el vidpunkto de la partipolitikaj interesoj de la decidaj partipolitikaj faktoroj en la bloko, klare formulitaj en la nuna oficiala partipolitika linio. Tiu linio postulas partipolitikan agadon unuavice en organizaĵoj konservantaj la fasadon de politika neŭtraleco kaj sendependeco, kun sidejoj en demokrataj landoj, tial ankoraŭ kredindaj, aldone al agitado kaj propagando pere de organizaĵoj kun sidejoj en la bloko, rekte financataj kaj aperte dependaj de la ŝtataj-partiaj instancoj, tial komplete kompromititaj ekster la bloko. Tiu linio estas dokumente prezentita en tiu ĉi rubriko de *Horizonto* n-ro 4/77, p-oj 79-80.

Plej verŝajne la menciita sekreta kunveno ricevis instrukciojn pritrakti la taktikon aplikotan por partipolitika propagando dum la UK en Varna, ĉefe pere de la t.n. Mondpaĉa Esperanto-Movado (MEM), kiel ankaŭ la intensigon de la kampanjo kontraŭ la neŭtralan Esperanto-Movadon, ĝian laŭparolilon *Horizonto* kaj, aparte, la redaktoron de tiu ĉi rubriko per novaj kalumnioj kaj elpensadoj. La baldaŭa estonteco montras la ĝustecon aŭ neĝustecon de tiu ĉi antaŭvido.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 5.3 kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

DU PRECIZIGOJ DE D-RO T. CARLEVARO

Per sia letero de 14.04.78, adresita al la redakcio de *Horizonto* kaj plusendita de ĝi al la redaktoro de tiu ĉi rubriko, D-ro Carlevaro faris du precizigojn pri la eroj 15.1 kaj 17 de ED en *Horizonto* n-ro 2/78, p-oj 42 kaj 43. Volonte ni komunikas la esencon al nia legantaro:

15.1 J. Belov. — D-ro Carlevaro informas, ke lia «agado favore al la elkarcerigo de s-ro Belov komenciĝis longe antaŭ la Tria Konferenco» kaj ke, sciiginte pri la kazo el tagjurnalo «*Corriere del Ticino*», li kunlaboris en tiu ĉi afero kun la sekcio de Amnestio Internacia en Graz. Li «ne povis scii, ke ankaŭ la Tria Konferenco... serĉis analoge helpi al s-ro Belov» kaj, sekve, li «nenion prisilentis».

Estas ĝojige konstati, ke plia persono en la Esperanto-Movado kunlaboras kun AI kaj ekagis favore al liberigo de J. Belov jam antaŭ la Tria Konferenco de NEM. Aliflanke restas la fakto, ke la Tria Konferenco informis per longa telegramo la Estraron de UEA, kiu tiam kunsidis en Reykjavik, kaj ke nek pri la kazo Belov, nek pri la iniciato kaj agado de NEM kaj de ĝiaj unuopaj apogantoj favore al Belov aperis kio ajn en la organo de UEA. Tio certe estas konscia prisilento.

17. «*INICIATO DE UEA FAVORE AL INTERLINGUA*»? — D-ro Carlevaro certigas, ke «nek UEA nek CED nek... malŝatindaj interlingvistoj iel rolas en la afero». S-ro Berger, «ano de Interlingua» kutime uzas por Usono la mallongigon USA. «En tiu artikoleto» — skribas D-ro Carlevaro — «li tutsimple volis skribi, ke USA faris iniciaton favoran al Interlingua (temas pri eldono de fitopatologia libro en Interlingua — fakto, kiu por li signifas oficialigon de Interlingua fare de Usonol», sed la tajpista «aŭ kompostista» diableto transformis la anglalingvan USA al esperantlingva... UEA!».

Ni volonte kredas, ke *en tiu ĉi kazo* (tial la titolo estis kun demandosigno) temas pri preseraro. Se fakte tiel, nome se la interpreto de D-ro Carlevaro estas ĝusta, UEA devis tuj reagi kaj postuli korekton, kiel estis implicite en la fino de la ero 17 sur p. 44 de *Horizonto*. Kaj tiu korekto devis aperi ne en tiu ĉi rubriko, kion ni tamen lojale faras, sed en la bulteno *Revista de Interlingua*, se necese en *Esperanto*.

Aliflanke — ankoraŭfoje — la manio de plalingvismo kaj interlingvistikismo, kiuj nun jubilas en la Esperanto-Movado, ja kuraĝigis diversajn protagonistojn de mortnaskitaj lingvoprojektoj kaj komprenigis al ili aŭ kredigis ilin, ke jen, fine, «venis ilia tempo». Ekzemple, en la sama bulteno *Revista...*, n-ro de junio 1977, aperis jubila komento pro la publikigo de recenzo pri libro de Berger en la revuo *Esperanto* n-ro 2/77 su bla titolo «Fine, nun fenestro malfermiĝis». La «nova sinteno» de UEA, kiu «metas finon al nekomprenebla konspiro de silento», ktp. — estis por s-ro Berger «feliĉiga surprizo». Kaj tion — aldone al la kontraŭscienca egaligado de la socie enradikiĝinta kaj vivanta lingvo Esperanto kun mortnaskitaj lingvoprojektoj en la menciita recenzo en *Esperanto*, en la posthamburga CED kaj abunde aliloke — s-ro Berger ja povis rigardi kiel «iniciaton de UEA favore al Interlingua». Senkonsidere al tiu subjektiva kompreno aŭ miskompreno, la tute superflua revivigo de la jam delonge entombigita sterila diskuto (ekde la t.n. Ido-krizo en 1908) objekte malutilas al Esperanto, kompromitas la tutan aferon kaj serioze obstaklas la solvon de la lingva problemo, kiel *Horizonto* jam plurfoje atentigis.

M A L L O N G E

DANSK ESPERANTO-FORLAG ricevis la 1-an de aprilo novan posedanton kaj novan adreson. La nova posedanto estas s-ro Bent Holm-Laursen, Sdr. Allé, 29, DK-8000 Århus, Danlando. La ĝisnuna posedanto, L. Friis, Ingemannsvej, 9, Åbyhøj, kiu fondis la eldonejon en 1932, devas pro aĝo kaj malpli bona sanstato rezigni sian entreprenon, kiu aperigis preskaŭ cent titolojn, i.a. Ĉu vi kuiras ĉine?, Fianĉo de l' Sorto, multajn Schwartz-librojn, kaj la konatajn lernolibrojn Tom kaj Tina, Sub la verda Standardo kaj Ne tiel, sed tiel ĉi. Holm-Laursen daŭrigos la viglan aktivecon.

Dankon por S-ro Friis pro lia senlaca aktiveco kaj sukceson al la nova posedanto en lia entrepreno.

En 1978 Jugoslavia Esperanto-Revuo «*VOCO*» solene prifestos sian modestan jubileon — 5-jarojn de regula aperado, kaj tiu-okaze estos aranĝita Esperanto-ekspozicio. Redakcioj de E-gazetoj, E-eldonistoj kaj unuopuloj estas petataj sendi gratulojn kaj alian E-materialon uzeblan por ekspozicio al adreso: Jugoslavia Esperanto-Revuo, «*VOCO*», Skolska ul. 25, 56227-BOROVO, Jugoslavio. — Kontribuantoj ricevos belan kolan dank-pk.

Koran gratulon al la Redakcio de «*VOCO*».

TUTMONDA EKSPOZICIO. — Okaze de SAT-Kongreso en la urbo Lectoure (Francio), la OKK. organizas grandan, tutmondan ekspozicion.

Tiu ekspozicio prezentas du partojn: — infanaj desegnaĵoj — la vivkondiĉojn de la laboristoj.

Por la unua parto, infanoj el ĉiuj landoj estas petataj sendi al la organizantoj belajn desegnaĵojn. Por la dua parto, esperantistoj bonvolu sendi almenaŭ UNU objekton rilatantan la temon, el ĉiu lando (afiŝojn, bildojn, leterojn, metiajn produktojn... ktp.). Pliajn informojn donas la OKK. S-ro Jean-Claude BOURGEAT, Saint-Puy F-32 VALENCE SUR BAISE (Francio).

EKSTERORDINARA KUNVENO DE HEF. — La 30-an de aprilo okazis en Madrid, Eksterordinara Kunveno de la Hispana Esperanto-Federacio. — Nura punkto en la tagordo: Elekto de nova estraro. — Antaŭtempe kandidatis esperantistoj el kvar urboj (Alicante - Barcelona - Sabadell kaj Valladolid) por okupi la kvin ĉefajn postenojn de la estraro. Post kontrolo de ĉiuj validaj balotiloj ricevitaj (la balotado okazis ne nur persona, sed ankaŭ per la poŝto) estis proklamitaj la kandidatoj el Valladolid kiel novaj estraranoj de HEF, sub la prezidanteco de S-ino M.^a Rafaela URUEÑA, Juristo, profesoro-(ino) pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid (Hispanujo).

LA AMOROJ DE P. DE RONSARDO AL HELENA

(1578)

Ĉar estas ŝi nur vintro, nur neĝa flok' sur floko,
Ĉar ŝian koron armas, ho ve! glaciaj zonoj,
Ĉar ŝi nur celas tiri renomon el kanzonoj,
Malĉenu vin, freneza! Fuĝu de ŝia logo.

Kiom min servas ŝiaj nomgrando, ras-arogo,
Krom por honorservuto kaj belaj amprizonoj?
Damo, jam mi ne tiel griziĝis de l' sezonoj,
Ke kelkaj ne volontus stari sur via loko.

Amor', infan' estante, ne kaŝas pri la vero;
Kaj vi ne tiom riĉas je beloj kaj fiero,
Ke vi malŝatu koron de lojalec' ĉiama.

Mian aprilon rei estus vana postulo.
Min amu, per favoro, eĉ se mi nun grizulo,
Kaj mi vin amos, kiam vi iĝos tia sama.

—oOo—

Por via fam' mi plantas ĉi arbon de Cibela,
Pinon, kie legiĝos ĉiam pri vi honore;
Je l' trunk' mi skrapis niajn du nomojn, amantmore,
Kiuj plu kreskos vete kun la noviĝo ŝela.

Ho Faŭnoj, kiuj loĝas la patran landon, ĉe la
Loirriver' plektante viajn dancrondojn fiore,
Helpu al tiu planto kaj ŝirmu ĝin favore.
Kontraŭ someraj bruloj kaj vintra frost' kruela.

Paŝtist', kiu ĉi tien kondukos la ŝafaron,
Eklogon priflutante per via tub' avena,
Al jena arb' ŝildeton alkröĉu ĉiun jaron,
Ke la pasantoj sciu pri mia amo splena.
Per lakt' kaj ŝafidsango ŝmirante ĉi altaron,
Diru: Ĉi pino sanktas, ĉar planto de Helena.

—oOo—

Ĉi longajn vintrajn noktojn, kiam la senokupa
Lun' tiel lante turnas sian rondiran vagon,
Kiam tardema koko anoncas al ni tagon,
Kaj nokto ŝajnas jaro al la anim' ennuba,
Mi mortus de aflikto sen via formo duba,
Kiu simule venas mildigi mian plagon,
Kaj tute nuda kuŝas en mia sin', imagon
Mian logante dolĉe per ia ĝojo dupa.

Vera, vi kruelege sovaĝas de fiero.
Vin, falsan, oni ĝuas en plena amlibero.
Tuj ĉe fantomo via tenere mi ripozas.

Nenio rifuziĝas al mi. La dormo brava
Mian pasion trompas per tia falso rava.
En am', ne tiel gravas sin trompi, mi supozas.

—oOo—

Neniu miru, diris la bona oldularo
Sur la mureg' de Trojo, gvatante pri Helena,
Ke pro beleco tia nin trafas plago jena:
Ne indas niaj veoj je ŝia okulparo.

Tamen prefere Marson fleksi per milda ŝparo
Kaj al la edz' redoni ŝin por vetur' revena,
Ol vidi nian landon de sangoj tiel plena,
Havenon venkprenita kaj sturmon al remparo.

Ho, ja ne decis, Patroj kun trema forto aĝa,
Junulojn miskonsile reteni kaj malhardi;
Sed devis junaj, oldaj, en kuna vol' kuraĝa
Por ŝi la korpojn, havojn kaj urbon prihazardi.
Menelas estis saĝa, Pariso same saĝa,
L'unua ŝin postuli kaj l'alia ŝin gardi.

Por ke tra la jarcentoj por ĉiam restu viva
L'amo perfekta, kiu al vi Ronsardon tiris,
Kiel via beleco de li prudenton ŝiris,
Kiel vi lin katenis, kvankam libersoifa;

Ke tra l' tempaĝoj restu al nepoj fam' edifa,
Kiel en mia sango via vizaĝo spiris,
Kiel, krom vi, nenion la kor' en mi deziris,
Estu al vi donace ĉi planto semperviva.

Ĝi longatempe vivas en sia juna forto,
Kaj mi dum longa tempo vivigos vin post morto,
Tiom la dokta zorgo valoras de servanto.

Nobla, kiu nur virton celas en la amvibro.
Vi vivos kiel Laŭra kaj kreskos mem en grando,
Almenaŭ kiom vivos la plumoj kaj la libro.

—oOo—

Vi super mi triumfas, kaj al vi estu dono
Jena hedero, kiu glitflue penas kovri
La arbojn kaj la murojn, ŝajnante ilin kovi
Faldo sur fald' kaj plekte vindi per viva zono.
Al vi nun apartenas de ĉi heder' la Krono.
Mi volus, kiel tiu, nokte kaj tage, povi
Tuj kontraŭ vi min fleksi kaj amlangvore ŝovi
Fortikajn nodojn ĉirkaŭ vi mem, bela kolono!
Ĉu do ne venos tempo, por iam, sub branĉaro,
Matene, dum Aŭroro elvekas ĉion mire,
Ĉe l' pepoj de la birdoj, en paca ĉielklaro,
Per duonfermaj lipoj kisadi vin, sopire
Rakonti pri l' sufero, kaj per mia brakparo
Ĉi rozojn kaj eburon brakumi laŭdezire?

—oOo—

Kiam vi, tre maljuna, ĉe l' vesperlum' kandela,
Sidados apud fajro, kombante kaj ŝpinante,
Vi kantos miajn versojn kaj diros, sopirante:
Ronsard' iam min gloris, kiam mi estis bela.
Nu, kia servistino via, ĉe fam' tiela,
Eĉ jam laborolaca kaj dormon dezirante,
Je l' sono de Ronsardo ne vekos sin, mirante,
Benanta vian nomon brilan de laŭd' fabela?
Mi estos sub la tero kaj, nur fantomo vana,
Inter la mirtaj ombroj mi ĝuos mortripozon;
Vi estos ĉe l' fajrujo maljunulin' kaŭranta,
Pri mia am' kaj via malŝat' bedaŭranta.
Vivu, se vi min kredas, ne revu, morgaŭana,
Rikoltu de la vivo, hodiaŭ jam, la rozon!

—oOo—

Estrino, min brakumu, min kisu plej intima,
Spiro ĉe spir' la vivon ardigu per kisvarmo,
Kisojn al mi, mi petas, donu en fola svarmo:
Amor' ne konas leĝon, deziras nur senlime.
Min kisu kaj rekisu! Ho bela buŝo, krime
'stas gardi vin por, transe, lividiĝinta karno
Kisi Plutonon, lia aŭ tron- jam aŭ lit-garno',
Fantome senkolara, de vi mem malproksime.
Dum viva, min premegu ĉi lipoj, rozsimiloj;
Balbutu, inter kisoj duonfermitaj, milojn
Da vortoj rompetitaj, en mia sin' mortante.
Mi mortos en la via; poste de nova febro
Revivos ni; tiele ni iru ĝis translande:
La tag', eĉ se mallonge, pli dolĉas ol tenebro.

Tradukis el la franca
G. Waringhien

SANDOR TATAY naskigis en 1910 en Bakonytamási en la okcidenta parto de Hungarujo. Post luteranaj teologiaj studoj en Sopron, li akiris diplomon pri humanismaj studoj ĉe la Universitato de Pécs. Tamen, li ne elektis kleran profesion, sed ekvojaĝis kaj vagadis perpiede tra granda parto de Eŭropo. Post sia reveno al Hungarujo en la 1930-aj jaroj, li laboris en teks-fabriko kaj poste dediĉis sin al libro- kaj paper-komercado.

Liaj unuaj beletraj verkoj aperis dum la 1930-aj jaroj. En tiuj romanoj kaj noveloj li kreis baladsimilan etoson kaj prilumis ĉefeme la karakterizajn trajtojn de la kamparana ĉirkaŭmedio. De 1937 ĝis 1942 li estis redaktiano de Kelet Népe /Popolo de Oriento/, beletra, sociologia kaj kritika revuo. Du romanoj enhavantaj imponajn bildojn de tiu periodo en Hungarujo estas Zápor /Pluvego/, eldonita en 1941, kiu priskribas la vivon en hungara vilaĝo inter la du mondmilitoj, kaj Húshagyókedd /Antaŭfesta Mardo/, aperinta en 1943, kiu temas pri la mondkoncepto de la tiutempa budapeŝta socio.

Post la dua mondmilito li denove publikigis siajn verkojn kaj fariĝis premiita verkisto. Lia ĉefverko estas la roman-ciklo A Simeon család /La Familio Simeon/, kies kvin volumoj aperis inter 1955 kaj 1964. Tatay reiras al la epoko, kiun li travivis kiel junulo, kaj kontraŭ la fono de la hungara socio de la 20-a jarcento, li pentras la disfalon de monduma familio. En 1958 li gajnis la grandpremion en la film-festivalo de San-Francisko por la scenaro de Ház a sziklák alatt /Domo sub la Rokoj/. Lia infanromano Puskák és Galambok /Pafiloj kaj Kolomboj/, publikigita en 1960, fariĝis tre populara; ĝi estis tradukita en plurajn lingvojn kaj ankaŭ prezentita kiel filmo.

Sándor Tatay debutis en Esperanto en Hungara Vivo /1968, n-ro 3, per La Memolibro, literatura eseo tradukita en Esperanton fare de K. D. Gyulai. La novelo tradukita tie ĉi, Nagyágyú /Grandkanono/, troviĝas en la kolekto de noveloj de la jaro 1961, Kelj fel és járj! /Leviĝu kaj Iru!/.

GRANDKANONO

de Sándor Tatay

Estas konata afero, ke la plej grandan kanonon en la mondo farigis Sultano Mohamedo la Dua antaŭ duonmilo da jaroj, kiam li komencis la sieĝon de Bizanco. La diametro de ĝia faŭko estis unu metron larĝa, kaj kvindek paroj da bovaj trentiris la pafiltubon al la batal-scenejo: krome, kvar fortmuskolaj bubaloj tiris ĉiun unuopan kuglon sur aparta ĉaro.

La unua pafotuj pruvis la teruran efikecon de la kanono, ĉar kiam la grandega ŝtonkuglo retroruliĝis de la urb-murego, ĝi forbalais per unu fojo kvindekono el inter la sieĝantaj turkoj. Kvindek turkoj ne kalkuliĝis kiel multo en la nenombrebla armeo de la sultano. Mohamedo tute ne estis molkora; ni ja scias, ke antaŭ ol li fariĝis turka imperiestro, li sabre buĉis aron da pretendantoj al la trono, inter aliaj ankaŭ sian propran frateton. Sed li estis terure impulsigema homo, kaj ankaŭ tiuj bagatelaĵoj kolerigis lin. Per sia skurĝo li tiel draŝis la vizaĝon de la farinto de la kanono, certa homo nomata Urbano, kiu krome, estis hungar-devena, ke ties haŭto fariĝis plena de ruĝaj lacertoj. Ekscitigante, la granda sultano kriegis:

— Mia ĉevalo tretos sur vian ventron, vi fripona nekredantaĉo! Mi ŝtopigos vian kanontubon per vi sub la kuglo, se vi ne tuj pafdetruas la Ursopordegon.

Urbano verŝis du barelojn da pulvo en la kanontubon kaj trafrafis tien. Skuiĝis la Ursopordego, kiun la turkoj nomis la «Porkpostaja Kiseton», kaj apud ĝi estiĝis tiel granda breĉo en la malnova muro, ke spahio kun ĉevalo povis eniri tra ĝi.

Mohamedo tiam feliĉe frapetis la kapon de la kanonfaristo per la tenilo de sia skurĝo kaj forrajdis por sendi sturmi kelkmilojn da prete atendantaj spahioj. La spahioj piedbatis la ventron de siaj ĉevaloj kaj kun nekredbla rapideco galopis en la direkto al la breĉo. Nu, Urbano, entuziasmigante pro sia eksterordinara sukceso, rapide ellasis ankoraŭ unu kuglon apud la Ursopordegon. Sed ankaŭ la bizanca dio, vidante la pecon de la kristanoj, enmiksiĝis en la batalo, kaj dum Ahalo revis pri la ĵusa sukceso, la alia kuglo bele sidiĝis en la breĉo, kiun la antaŭa estigis. La turkoj jam ne povis bridi siajn ĉevalojn en la lasta momento, kaj la kapoj de ĉevaloj kaj spahioj displatigis sur la dua kuglo de Urbano. Pro tio, do, la kanonfaristo, kiu samtempe estis artileria serĝento, trovis sin en granda embaraso. Li sendis kuglon post kuglo tien, por ripari sian eraron kaj iamaniere savi sian haŭton de la kolero de la furioziĝinta sultano. Sed tiuj ĉi kugloj, amasiĝante senorde unu sur la alia, tiel fortikigis la «Porkpostajan Kiseton», kiu ĝis nun estis la plej malforta punkto de la urbo, ke dum longa tempo la grekoj havis nenion da zorgoj pri ĝi.

Malfeliĉa Majstro Urbano, pro sia timo, tute perdis sian senson pri proporcioj; li preterpafis treege internen de la urb-murego. Tie ĉi sur monteton kvar kugloj falis unu apud la alia, kvadratforme, kaj la kvina sur la supron de la piramido. La bizancaj infanoj suprengrimpis tiun ĉi rapide estiĝintan konstruaĵon kaj kun la manoj ĉe la kapo, faris signon de azenoreloj antaŭ Mohamedo. Car la kristana

moralo en Bizanco tiutempe jam tre de-
generis, troviĝis inter la etuloj ankaŭ tiu,
kiu levis sian tunikon kaj montris sian
nudan postajon al la nemezurebla turka
tendaro. Kaj la plej malpiaj recitis tri-
vialajn rimajojn, kiuj rilatigis tiun ĉi
agon kun la nomo de Mohamedo.

La sultano denove galian al la grand-
kanono kaj komencis tian turkan blas-
femon, tian tondran riproĉadon, ke tre-
mis ne nur la genuoj de Majstro Urbano,
sed ankaŭ tiuj de la tuta tendaro de cent
kvindek mil homoj. Sed fine li fuŝis ĉion,
ĉar alten levante sian glavon, li tiel kriis:

— Mi laŭlonge disfendos vin en du par-
tojn per unu hako, vi hundidaĉo!

Je tio, malantaŭ lia dorso j u vic-bejo
nomata Effendi Keffelendi /laŭ aliaj fon-
toj Keffendi Effelendi/ komencis laŭtege
malobstruki la gorĝon. En la tendaro,
ĉiu ja bone sciis, ke fendi homon laŭlon-
ge per unu hako povas neniu alia ol Bejo
Skander, kiu tiutempe jam estis nomata
la bastiono de kristanismo. Kaj li ĝuste
meritis tiun ĉi gloran nomon pro sia per-
fekta tekniko de buĉado. Ili sciis ankaŭ,
ke pro tiu ĉi fakto Mohamedo estis dia-
ble envia. Sed vane li ekzercis sin de jaroj
per miloj da nekredantaj kaptitoj, li ne
sukcesis eĉ unu fojon.

Al tio ĉi aldoniĝis, ke li eĉ ne povis
frapi la terurigitan artilerianon. Tio ĉi
okazis en la unua monato de la sieĝo,
kiam ankoraŭ ne venis en lian kapon sur-
ŝutigi la montojn per salo, ŝmirigi la mal-
supraĵojn de la ŝipoj per sebo kaj tren-
tirigi ilin surtere de la vasta maro en la
golfon ora Korno. Dum tiuj ĉi tagoj tiu
kanono obsede fariĝis lia fiksa ideo. Tiom
li kredis je tiu hurlanta monstro, ke li
opiniis eĉ superflua la defiladon de la
armeo de cent kvindek mil homoj. Tio
ĝustadire estis ja ridinda kontraŭ la kelk-
mil lacaj kaj moliĝintaj uloj en la ĉirkaŭ-
sieĝita urbo Bizanco. Tiuj historiistoj,
kiuj vestis Mohamedon la Duan per ĉias-
pecaj grandiozaj kvalitoj opinias, ke tiu
ĉi ago devenis ĝustadire nur el lia ĝentile-
co. Li estus opiniinta malkonvena afero
fini la miljaran brilon de la orienta me-
tropolo per iu ajn senvalora armeo, kaj
sen iu pli signifa bruego transpaŝi la
limon de la Meza kaj Moderna Epokoj.
Mohamedo certe venis tien ĉi por doni al
la longa vico da orient-romiaj imperies-
troj la funebran solenon, kiel kapablas
fari tion tia grandsinjoro.

Sed nun li kolerege ekscitiĝis pro la
impertinenteco de la malbonkonduktaj
buboj. Tamen, en la grekaj virinoj estis
tiom da honesteco, ke ili rapide forpelis
la infanojn de la kanonkugloj per vango-
frapoj, dirante: «Se vi porkaĉe kondutas
tie ĉi, stinkaj buboj, baldaŭ la pafilo de
Urbano trafos vin sur la postajon».

Unuvorte, Sultano Mohamedo, kiun
aliaj historiistoj opiniis la plej granda
monstro de la mondo, kolerege ekscitiĝis
kaj planis teruran venĝon. Sed nun kun
pli milda voĉo li turnis sin al la muldinto

de la kanono, ĉar tamen per tiu ĉi kano-
no li volis venkakiri Bizancon.

— Atentu min, Urbano, se vi ne tuj
pafdetruos por mi la preĝejo Sofia, bal-
daŭ mi faros hakitan viandon el vi.

Ke li scipovas fari hakitan viandon ja
kredis la apudstarantoj, kaj ĉi-foje neniu
tusetis. Urbano verŝis tri barelojn da pul-
vo en la kanontubon kaj li faris tiel gran-
dan knalon, ke la akvo de la Golfo Ora
Korno superbordiĝis. Sed la kuglo ape-
naŭ flugis pluen de la aliaj ol la distanco,
je kiu oni povas j eti ŝtonon kaj ĝi pigre
faletis ankoraŭ malproksime antaŭ la
preĝejo Sofia, kies ora kupolo nun tiel
brilis, kvazaŭ la suno pro iu miraklo su-
birus oriente. Teruro kaptis Urbanon, ĉar
verdire li naskiĝis kristana homo. Li grat-
tis la malsupron de sia orelo kaj verŝis
en la kanontubon kvar barelojn da pulvo
kaj faris tiel grandan knalon, ke la paĝoj
en la grandegaj sanktaj libroj de la bi-
zancaj pastroj komencis transturniĝi, sed
la kuglo ankaŭ nun falis malproksime de
la preĝejo.

Mohamedo, pro sia furiozo, ŝiris sian
antaŭtufon, kaj la vejnoj elŝvelis sur liaj
tempioj, sur lia frunto kaj sub liaj oku-
loj. Li pugne premis siajn manojn kaj
kvazaŭ li dirigentus iun gigantan orkes-
tron, faris gestojn per siaj pugnoj.

— Pluen! Pluen!

Urbano verŝis en la nesatigeblan kanon-
tubon ses... sep... ok... dek barelojn da
pulvo kaj pafis, pafis, sed tute vane, la
preĝejo restis sendifekta.

Mohamedo hurlis kiel ŝakalo, kaj la
vejnoj jam tiel elŝvelis sur lia vizaĝo, ke
estiĝis sur ĝi ĝuste tiaj ruĝaj lacertoj kiel
sur la vizaĝo de Urbano, kvankam neniu
skurĝis lin inter la okuloj.

Urbano verŝis dek unu barelojn da
pulvo en la kanontubon. La montoj tre-
mis, la nuboj disŝprucis sur la ĉielo, la
malpezaj ĝenovaj galeroj leviĝis sur la
ondoj de Bosporo pli alten ol la supro
mem de la celita preĝejo, sed la ora ku-
pola restis sendifekta.

— Dek tri en ĝin! — kriegis Mohame-
do. — Dek tri! — Nekredantaĉo, generita
de la diablo!

Timo ekkaptis Urbanon, ĉar li vidis, ke
la kanontubo fariĝas ŝvelventra. Sed li
vidis, ke ankaŭ la kapo de Mohamedo pli
kaj pli vastiĝas pro kolerego. La ruĝaj
lacertoj sur lia vizaĝo jam ŝanĝiĝis en
serpentoj kaj krokodiloj. Li enverŝis la
dek tri barelojn da pulvo. Helpe de kvar-
dek homoj kaj speciala levilo, li rulis en
la tubon la multkvintalan kuglon, poste li
ekbruligis la meĉon kaj krucosignis.

— Nun do! — diris la sultano kaj li
daŭre pugne premis siajn manojn kaj
pufigis sian vizaĝon. Sed nun la apudstar-
rantoj ne atentis la brilan fizionomion de
la sultano, sed vidis, ke ankaŭ la kanon-
tubo ekŝvelas. En la sekva momento kna-
lego pli granda ol ĉiu antaŭa ekskuis la
tendaron.

La sultano rimarkis nur, ke lia ĉevalo malaperas de sub li, kaj li obtuze falas sur la teron.

Sanceliĝante, li tre malfacile stariĝis, ĉirkaŭrigardis kaj ne vidis vivantan estaĵon en sia proksimeco. Ĉe liaj piedoj kuŝis la kapo de Majstro Urbano. Kolege li piedbatis ĝin kaj eligis grandan blasfemon. Tiam li turnis sin malantaŭen kaj tie li vidis inter la sangaj disŝiritajoj la jam menciitan bejon Keffelendi, kiu cetere estis famekonata pro tio, ke li estis tre religiema kaj li havis la plej grandan nombron da edzinoj inter ĉiuj bejoj. Tiu ĉi Effelendi genuis sur la tero, laŭvoĉe preĝis kaj kelkfoje ĵetis sian tutan korpon surteren tuŝante la sangajn terbulojn per sia frunto.

— Kion vi faras, vi simio! — la sultano kriis al li. — Ĉu vi frenezigiĝis, murmurante dankopreĝon, kiam ni havis tiel malbonan travivaĵon?

— Ho Via Moŝta Sinjoro — respondis la vic-bejo, kies voĉo jam tute malfortiĝis inter la multaj preĝoj kaj edzinoj —, certe mi esprimas dankon, ke tiu ĉi kanono eksplodis, ĉar de unu horo mi atentis vin kaj mi estas certa, ke vi mem eksplodus, se tio ne okazus. Mi vidis, kiel via kapo pufiĝis, viaj ŝultroj leviĝis, via brusto plivastiĝis. Poste, ankaŭ via ventro terure ŝvelis. Respekto ne manku, se mi diras, ke via postaĵo fariĝis du spanojn pli larĝa ol tiu de la ĉevalo. Mi klare vidis tion, tuj kiam mi alvenis malantaŭ via dorso, kaj tia teruro kaptis min, ke mi jam tiam komencis preĝi. Ni du restis vivantaj, Via Moŝta Sinjoro, ĉar vi sidis sur la dorso de la ĉevalo, kaj mi kuŝis ventre sur la tero. Sed nun mi es-

primas dankon al Alaho, ke li elpelis el via kapo tiun kapriceton, ke la kanono estas ĉio. Ho Sinjora Moŝto, dank' al miaj multaj edzinoj, mi informiĝas pri ĉio, kion la amasoj priklacas. Mi scias, kian pekon vi faris, kiam vi komencis adori tiun kanonon kiel oran bovidon, kaj vi tute forgesis pri la centmilaj homamasoj. Tiu okazintaĵo do estu admono por vi, bona Sinjora Moŝto, kaj ĝi kreu pli grandan lumon ol tiu de la suno en via alie brila kranio.

— Vi pravas, Effendi, — diris Mohamedo penteme.

La sultano forturnis sian brilan rigardon de la ruinoj de la kanono, turnis ĝin al la centmilaj amasoj, kaj tiam okazis tio, kion ĉiuj historiistoj notas pri tiu sieĝo, ke la homoj alkroĉiĝis al la grandaj ŝipoj kaj pene tiris ĉiun unuope sur la vojo ŝutita per salo, tra montoj kaj valojoj, en la golfon Ora Korno, kaj per tiu ĉi artificio kaj ankoraŭ ege multe da sangoferoj, ili venkakiris Bizancon, kaj tiu ĉi okazintaĵo signifis la finon de la Mezepoko.

Oktobro, 1977.

Tradukita el la hungara lingvo de Eva kaj Bernard Golden.

Originala titolo: *Nagyágyú*
el la volumo *Kelj fel és járj!*
Magvető Konyvkiadó, Budapeŝto, 1961,
paĝoj 121-127

PRIPENSIDA RAKONTO, el Arthur Koestler, en la aŭtobiografia libro: «*La Corde Raide*» (*La Streĉita akrobatodrato*) eld. Calmann-Lévy, Paris, 1953, pri la ŝafa senreageco de demokratioj antaŭ la tajdo de ekstremismaj danĝeregoj...

La ĉina ekzekutisto Uang Lun vivis sub la rego de la dua imperiestro de la dinastio Ming. Majstro en sia arto, li atendadis, piede de la podio, la kondamniton, kun afabla rideto, kaŝante la sabron malantaŭ sia dorso, kaj fajfetante agrablan arieton: li neatendite senkapigadis la viktimon dum la supreniro de l' ŝtuparo.


Po dekduo da ĉiutagaĵoj, li bezonis kvindek jarojn por fajnigi sian kulminan teknon: ne nur mortigi en kvieto kaj malstreĉo, sed ankaŭ tiel rapide, ke, pro inercio, la kapo restu ĉe sia ekzakta loko, senŝanĝa. Kaj iun tagon, li tiel perfekte tranĉis, ke la kondamnito daŭre supreniris, ne eksentinte la okazintaĵon.

Laca pro l' atendo, la viktimo diris: «Ho kruela Uang, kial vi daŭrigas la turmenton de l' atendo, vi, kiu tiel ĝentiladis kaj afabladis al ĉiuj miaj antaŭuloj?».

Do Uang komprenis ke granda ĉefverko ĵus kronis lian longan vivon. Plej ĉarma rideto heligis lian sulko-svarman vizaĝon, kaj li milde respondis:

«—Kondamnito Moŝto, konsentu kapsaluti!»

Trad. F. Liebl



SAN JUAN DE LA PEÑA

Tre malfacile estas por mi priskribi — aŭ nur simple skizi — tion, kion la okuloj kapablas vidi kaj iuj sensoj percepti en tiuj regionoj kaj lokoj de nekomparebla pejzaĝa beleco kaj glora historio ankoraŭ korbatanta en ĉiu restaĵo — en ĉiu postvivanta muro aŭ prilaborita ŝtono, en ĉiu natura aŭ kreita artaĵo, kiu sukcesis haltigi la forflugon de l' tempo — en la impona soleco kaj la majesto de tiu alta enmonta vala mondo riĉa je apikaj rokoj, dens-frondaj arbaroj, glimbrilaj herbejoj kaj ĉirkaŭaĵoj de severaj montoj (ofte, ankaŭ, mildkonturaj) de la centra Pireneo.

Guste tie, ekforĝiĝis la brava kaj nobla aragona karaktero. Guste tie ni devas serĉi kaj eltrovi la radikojn kaj la fontojn de la nuntempa fekunda virta fiero pri pasinteco transcenda — pri historiaj eventoj generantaj la mirindajn karakterizajn rasajn trajtojn de la Aragona lando — de ĝia gento.

Generale, ĉie, unue parolas la legendo, kaj nur pli poste la veraj historiaj faktoj. Do, ankaŭ en tiu pitoreska valo riĉa je kontrastoj — la valo de Atarés —, la legendo ŝvebas, kaj persiste, kvazaŭ susure, flustras ankoraŭ tion, kion la pergameonj aŭ la surmarmoraj tekstoj klarigas.

Lutempe estis nur asketaĵaj ermitoj la loĝantoj de tiu kruda paradizo, en la epoko de maŭra okupado: de la j. 990-a ĝis 1006-a, Almanzor kaj, poste, lia filo Abd al-Malik submetis la kristanajn grafajn teritoriojn de Aragono, Sobrarbo kaj Ribagorzo. Tiam, la ekzistantaj disaj monaĥejoj restis detruitaj. Sed ankaŭ malbonŝancis samsorte la strukturo soci-civila de la tri cititaj pireneaj landregionoj.

Sanĉo la Granda, el Navarra, inter 1016-a kaj 1020-a, forpuŝis la muzulmanojn kaj tuj restrukturis la antaŭan konkretan enlandan aktivecon. Tial, la iompostiomaj rekonstruitaj monaĥejoj fariĝis influaj fokusoĵoj de nova prosperanta vivo, favore al reakirado de tiu antaŭa jam aŭtoktona karaktero. Kaj ĝi ekremodliĝis akorde kun la novaj gravaj cirkonstancoj, sub signo de progreso, kaj laŭ influo de la benediktanaĵa kulturo kaj administrado.

La benediktanoj estis akirantaj, en siaj teritoriaĵaj ampleksiĝantaj agadlimoj, multajn bienojn. Kaj en la j. 1071-a la aragona reĝo Sanĉo Ramirez fondis novan monaĥejon, San Juan de la Peña, kun la helpo de la Cluny-a Abato Hugo. Ĝi tuj fariĝis Abatejo ricevanta multajn dotojn, privilegiojn kaj administrebajn terito-

riojn. Nur pro tiuj konkretaj faktoj oni povas konjekti kiel estis ebla tiel aktiva komunuma persista vivado meze de tiu medio en izolita abrupta regiono kie la agrokulturaj rimedoj ne estis eblaj. Tamen, en tiu etoso de soleco la kontempla retiriĝo trovis ĉion favora.

Tiu konvento fariĝis pli kaj pli grava kaj influa, pro diversaj eksteraj, favoraj faktoj, inter kiuj tre gravis la relativa proksimeco kun la tiama ĉefurbo Jaca, ĉar la monaĥoj povis facile propeti favore al si al la aragona reĝa kortego. Sed kiam la kronpolitika administrado, tra la forpaso de l' jardekoj, enradikiĝis pli kaj pli malsupren de la lando (en Huesca, Barbastro, Zaragoza), tiam la monaĥoj ekperdadis multe da favorisma helpo. Pli poste, jam en la XV-a jarcento, la komunumo decidis forlasi sian ŝirman groton, kiel tiu deziranta fine eliri el ombro persista, por tiel ĝui la sunradiojn kaj alrigardi konstante vastajn horizontojn. Konstruiĝis, do, nova monaĥejo, kaj preĝejo, pli supren, sur smeralda herbeja ebenaĵo.

En impona kaverno, sub baldakena rokego, situiĝas la unuaj konstruaĵoj diversepokaj de San Juan de la Peña. Kia mirindaĵo! Kia arkeologia trezoro primitiva — mozaraba, aŭ romanikstila propra je la Jaca-regiono! — jen belega abateja preĝejo starigita kaj konsekrita je honoro de sankta Johano la Baptista, el unu sola navo kun tri duoncirklaĵaj absidoj apudantaj al la rokego.

La roko, rand-elstarante, ŝirmtegas la klostron, kaj ĝi estas ankaŭ, ho!, tegmento de l' transepto. Do, kia unika kaj natura volbo!

La diversepokaj (do, diversstilaj) internaj konstruaĵoj kaj arkitekturaj detaloj, parolas prilume al ni koncerne homojn kiuj de malproksime je grandaj urboj, agis obstine kaj noblacele. La specialaj cirkonstancoj naturaj de la loko, devigis ke ĉio estu alpreninta senegalajn karakterizojn allogajn, laŭ bezonoj kaj konstantaj ŝanĝoj. Harmonie amasiĝas tie, do, elmontrojn plej variajn, kiuj atestas kon-

fidence la trafluadon de l' jarcentoj je aktiva vivo.

Jen la klostro, rava ombra-verda pacangulo!: jen svelta kolonaro kronita per romanikaj skulptitaj kapitejoj bildigantaj epizodojn el la Genezo, la vivo de sankta Johano kaj la evangelia publika vivo de Jesuo. Jen la sveltaj dovelaj arkoj de la vasta monaĥa dormosalono en la unua etaĝo. Jen la maŭzoleoj kaj panteonoj de reĝoj, nobeluloj, militestroj, protektintoj, abatoj, religiuloj. Jen la multaj tombaj surskribaĵoj kiuj prilumas nebulajn paĝojn de la aragonaj kronikoj kiuj fojfoje malfermiĝas plenaj je duboj, implikajoj, enigmoj aŭ supozoj, laŭ la diro aŭ konjektado de historiistoj aŭ avidaj trasercantoj de l' pasinteco svaga.

Kiom da elstaraj nomoj de tiuj, kiuj iam estis superaj regantoj laŭ siaj propraj virtoj kaj kapablo, aŭ hereditaj rangoj kaj blazonoj: reĝoj, nobelularo, herooj, ekleziaj moŝtoj. Certe, Aragono havas tie siajn unuajn radikojn; kaj la cindro de tiu gloro, fariĝis maksimumaj atributoj en blazonŝildo de nobla orgojlo — en la koro kaj la rasa karaktero de ĉiu ido de tiu nobla lando.

Kiel dirite antaŭe, la monaĥoj iam translokiĝis pli supren, kaj ekokupis novan konstruaĵon en la j. 1682-a, sed la kuna preĝejo restis elkonstruita pli poste, en 1705-a. Bedaŭrinde, pri tiu posta komplekso estas jam de longe disfalintaj la monaĥaj ĉeloj, la refektorio, la klostro... Sed staras ankoraŭ la majesta preĝejo kiu elmontras, kiel antaŭe, siajn barokstilajn belajn fasadojn plenajn je artismaj valoraj detaloj.

Sed, antaŭ ol adiaŭi (ĝis revido!) tiun sorĉan ĉirkaŭaĵon de San Juan de la Peña, nepre ni devas iom pli supren laŭiri la montan ŝoseon per kiu ni alvenos al la senkompara belvedero nomata «Pirenea balkono». Tie, oni sentas sin reĝa aglo flugreganta glise la montaran senfinan vastaĵon.

Gabriel MORA i ARANA

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

«La infano ne ĉesas petoli» (Ekzercaro, § 20). Jam de kelka tempo per siaj atakoj la Redakcio de HEROLDO ne ĉesas ridindigi sin; denove per artikoleto de la 18-a de februaro 1978, titolita sen ironio: «*UNUECO ESTAS FORTO*». Pli malbonajn intencojn al opozicio oni neniel povas pruntedoni; sed tia malavara dono plej ofte spegulas la proprajn difektojn!

«*La t.n. «Neŭtrala Esperanto-Movado» — flustras la redaktora klaĉo — inspirita de la antaŭa prezidanto de UEA por detruo UEA, ĉar ĝi ne volis reelekti lin, havos sian konferenceton en Jaca (Hispanio) de la 22-a ĝis la 29-a de julio*». Jam per la literoj «*t.n.*» la Redakcio de HEROLDO perfidas mem sian insidemon. Jam ĉi tiu unua frazo, modelo de veraj malicaĵoj, eĉ ne seriozas! Ja kiu kredos, ke la «*konferencetoj*» de la NEM celas kaj kapablas «*detrui UEA*»? Guste nur la redaktorino mem de HEROLDO, kiu cetero kontribuis por la detruo de UEA per la artikoloj aperintaj jam de 1962 ĝis nun. Kaj kiu lasos sin kapti per la preteksto «*ĉar ĝi ne volis reelekti lin*»? Almenaŭ certe ne

la nuna prezidanto Humphrey Tonkin, kiu plurfoje rifuzis la kandidatigajn proponojn de prof. d-ro Ivo Lapenna por prefere esti elektita dank' al la voĉoj de la komunistaj partioj! Sed la malico de HEROLDO estas ankoraŭ pli evidenta en la dua frazo jena: «*Car la Universala Kongreso en Varna (Bulgario) komenciĝos la 29-an de julio, la hispana aranĝo evidente malhelpos al siaj partoprenantoj ĉeesti la Kongreson*». Senkonsidere, ke neniu iel kapablas malhelpi iun ajn partoprenanton forlasi unu tagon antaŭe la «*Konferenceton*» aŭ alveni unu tagon malfrue por «*ĉeesti la Kongreson*» — la aranĝo en Humlebaek neniel malhelpis UEA-komitatanon partopreni la kunsidojn de Rejkjavik! — oni povas demandi sin, ĉu «*konferenc-eto*» laŭdire tiel malgranda riskas endanĝerigi la trumpetatan sukceson de Varna!

Eĉ kvazaŭ por «desorĉi» tian riskon, jen la Redakcio peze mokpikas: «*En ĉiu antaŭa konferenceto — ni memoru, ke tamen temas nun pri la kvara! — aliĝis nur kelkdekaj personoj, kelkaj el kiuj poste esprimis sian seniluziigon, pro la ĉiama malobjektiva prisilentado de ĉio pozitiva, kio okazas en la organizita movado, kaj samtempe persona daŭra negativa atakado kontraŭ ĝi kaj ĝiaj reprezentantoj*». Nu, la sola homo, kiu «*poste esprimis*» ion, estas Reinhard Haupenthal, kaj ĉiu konas ja pro kia persona kaŭzo. Se ekzistas vera «*malobjektiva prisilentado*», ĝi plene regas en la kolumnoj de HEROLDO kaj ESPERANTO, en kiuj gazetoj ne eblas aperigi eĉ unu linion iom kritikan aŭ demandan, kiel plej klare pruvas la antaŭ nelonge presita broŝuro de d-ro Georges Salan pri la «*neŭtraleco*» de UEA. Aliflanke pri la malmulte «*pozitiva, kio okazas en la organizita movado*», sonoras tiom da ditiramboj en la samaj ĉi-supre menciitaj gazetoj, ke estas preferinde ŝpari la paĝojn de HORIZONTO ĝuste por tio, kion vi ne povos legi en la laŭdaj gazetoj. Sed por frandi vere senmotivajn kaj tamen «*datirajn negativajn atakojn*» kontraŭ unu homo, vi devos relegi la kolumnojn de HEROLDO jam de 1962, ĉar neniu povis ĉi-rilate superi tian talenton!

«*Feliĉe, la senkondiĉaj sekvantoj de la skisma movado estas treege malmultaj*», plue obstinas la Redakcio, kvazaŭ la nombro en la okazo estus kriterio de praveco! Jam la epiteto «*senkondiĉaj*» povas koncerni nur servantojn de totalismo, kaj ĉiu ja scias, en kiuj landoj, en kiu asocio regas nun tia sistemo. Krome nur pro la unupartieco de UEA-komitato, malakceptanta ian eblecon de demokratia kritiko en la asocia organo, povus ekesti ia skismo. «*Kelkaj el ili (la sekvantoj) — enŝovas la Redaktorino — estas eĉ kompromititaj pro sia ĉiama kverelemo*». Tial estas necese precizigi, ke la «*ĉiama kverelemo*» de HEROLDO datiĝas jam de dek ses jaroj! Cetere ĉu ne stranga la pensmaniero, kiu supozigas, ke kiu ajn ne alkonformigas sin al ia dogmo de la UEA-komitato, tuj kompromitiĝas kvazaŭ anatemia pro herezo? Verdire estas ĝuste la politikpartiaj deklaroj faritaj de la socialismlandaj oficialaj gvidantoj de UEA, kiuj kompromitas «*Esperanton en la okuloj de saĝaj homoj*» laŭ la vortoj de d-ro L. L. Zamenhof, kaj elmetas la asocion «*en kiu ili kvazaŭ laboras, al kompromitiĝo*». Kaj jen tia bedaŭrinda stato daŭras jam de 1974!

Sed en la vosto la veneno! «*ni ne dediĉus al ili, eĉ ne escepte, atenton, — fine skribpikas la Redaktorino — se ne estus necese foje atentigi la novajn esperantistojn kontraŭ la deloga danĝero de la falsaj profetoj*». Ni traduku tion en klaran lingvon; tio spegule signifas: ni daŭre malobjektive prisilentus ilian kaj ekziston kaj laboron, se ne estus la risko, ke ĉi tiuj malfermos la okulojn de la novaj esperantistoj, kiuj tial eskapos el la delogado de niaj falsaj profetaĵoj! Tiel per tia plia artikoleto HEROLDO montras sin tia, kia ĝi fariĝis jam de 1962, tuj kiam ĝin ekredaktoris s-ino Ada Fighiera-Sikorska!

—oOOo—

Feliĉe, ne ĉiuj gazetoj sarkasmas kiel HEROLDO!

Aperis iom detala raporto pri la 3-a Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, temas pri SLEA-INFORMILO, la organo de Sveda Laborista Esperanto-Asocio el Malmö: gratulon al la redaktoro Egon Göransson pro la sendependeco de lia penso!

En EHO (februaro 1978, I) tre klara artikolo de H. V. Rasmussen prezentas: «*Kio estas N.E.M.?*» «*NEM ne estas asocio; ĝi havas nek membrojn nek estraron. NEM estas la nomo de la malfirme organizita kunlaboro de nunaj kaj eksaj membroj de UEA, kiuj opinias, ke la statuto de asocio oni ne rajtas trakti kiel sensignifan paperon... Ĝi ne kontraŭlaboras UEA, kiel tiu estas difinita per sia statuto, kaj NEM ekzistos nur ĝis la momento, kiam la membroj de UEA sukcesos efektiviĝi, ke la asocio respektos sian propran statuton. La partoprenantoj de NEM arde deziras, ke tiu momento baldaŭ venu, ebligante la nepre necesan kunordigon de la fortoj, kiu povos sekurigi la revivigon de la antaŭaj progresoj de la («minuskla») neŭtrala Esperanto-Movado.*» Jen trafa respondo al la sarkasmoj de HEROLDO!

En la TURISMA ESPERANTO-KALENDARO eldonita de la Turisma Servo de TEJO estas anoncita la 4-a Internacia Konferenco de NEM en Jaca. Ĉi tiu celtaŭga libreto simple kaj nete prezentas pli ol 130 anoncojn de Esperanto-aranĝoj en 1978.

—oOOo—

Kompense, el STARTO (1978/I) jen estas anoncite, ke la transpago de kongreskotizoj al Varna daŭros nur «ĝis la fino de marto»: kial ne pli longe? Kaj la venonta XI-a Konsultiĝo de la gvidantoj de la esperantaj organizaĵoj el eŭropaj socialismaj landoj okazos de la 21. ĝis la 27. 3/78; kio — kiel vi scias — konsistigas jam de 1970 unu asocion en la asocio UEA, same kiel «ŝtaton en ŝtato»!

Der esperantist (n.º 86) plu pridiskutas politikajn temojn. «Pri la IX-a Kongreso de Kulturligo: Socialismo — Kulturo — Vivmaniero.» Pri Rejkjavik: ĉiuj diskutoj pri la kongrestemo evidentigis, ke la realigo de la rajto je komunikado estas unuavice determinata per politikaj-ekonomiaj faktoroj. Baza kondiĉo, cetere, por solvo de la mondvas-taj problemoj de komunikado, tiel estas subskribite, estas paco kaj malstreĉiĝo laŭ la rekomendoj de la Fina Akto de Helsinki». Nu, kiel povas aspekti tio nun post la konkludoj de la Konferenco en Beogrado? Des pli, ke la 10-an de decembro 1978 estos solenata la 30-a datreveno de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Krome, estas emfazite, ke «D-ro Tonkin estis elektita nova prezidanto de UEA, kaj tio per 47 el 48 voĉoj». Ĉar estas indikite, ankaŭ ke la tuta komitato konsistas el 70 membroj, tio signifas, ke forestis do 22 komitatanoj, preskaŭ la triono, kaj la rimarkinda rezultato bone stampas la nunan komitaton! Kompreneble estas substrekite, ke «la publika kunveno de MEM estis dediĉita al la temo «Realigo de la Fina Akto de Helsinki». Kaj ne mirigos vin ekscii, ke «precipe necesas malebligi la daŭrigon de la vetarmado kaj la produktadon de la projektita en Usono neŭtrona bombo, kiu evidente estas konceptita kiel agresa armilo!» Kaj jen sekvas eĉ intervjuo de la prezidanto de la Monda Pac-konsilantaro, s-ro Romesh Chandra, kiu deklaras interalie: «Temas pri la batalo por la forigo de la fokusoj de militdangeroj; plue (pri) grandaj solidaraj agadoj por Ĉilio, Urugvajo, Brazilio, Paragvajo kaj aliaj landoj, por la viktimoj de la faŝismo kaj neofaŝismo». Certe la listo ne estas kompleta; mankas pluraj nomoj, kaj nomoj de landoj, kiuj ne situas en Sud-Ameriko! Sed spite ĉion ĉi-supran la ĝenerala sekretario de UEA deklaras unu plian fojon, ke li ne vidas eĉ ombron da malneŭtraleco en la agado de la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR!

—oOo—

Ja, PACO, kiel organo de MEM, la Mondpaca Esperantista Movado, kiu estas de Soveta Unio «senkondiĉa sekvanto» (laŭ la esprimo de HEROLDO), ne povas esti neŭtrala; sed, ĉar ni retrovas en la personaro de la revuo multajn homojn, kiuj gvidas ankaŭ asociojn aliĝintajn al UEA, kiel Violin Oljanov kaj Nikola Aleksiev (de Bulgario), d-ron Detlev Blanke (de G.D.R.), Stanislaw Swistak (de Pollando), d-ron Istvan Szerdahelyi (de Hungario), Renato Corsetti (de Italio), Drahomir Kočvara (de Ĉeĥoslovakio) aŭ eĉ Jim Deer (de Usono), la revuo sendube spegulas la pensmanieron de pluraj el tiuj gvidantoj, kies periodaj «konsultiĝoj» konsistigas — ni jam diris, sed foje estas bone ripetiti ĝin — «asocion en la asocio». Nu, el artikolo de Paŭlo Balkanyi oni povas nete legi: «Oni devas kategorie deklari, ke ia Esperanto-ideologio ne ekzistas. La tiel nomatan «internan ideon» aŭ «Esperantismon» oni ne povas konsideri kiel ian ideologion». Tiu ĉi simpla aserto, ke oni povas preskaŭ nei la ekziston de la Esperantismo (Ho! L. L. Zamenhof, E. Privat, Julio Baghy!), ebligas prezenti la veran celon de tiu nea-do mem: «Ankaŭ UEA, TEJO, SAT kaj aliaj devus ekzameni ian eblecon agnoski kaj kunlabori kun MEM, apogante ties agadon ekster siaj «neŭtralaj» aŭ propraj laboroj». Jen deklaro, kiu plej interesus d-ron Georges Salan. Atentu bone, gesamideanoj en UEA, vi baldaŭ senkonscie formos mem novan sektion de MEM!

—oOo—

Tute ne atendita kaj vere originala estas noveleto subskribita «Gufo» en OOMOTO (jul.-dec. 77) kun la titolo «Kial mi retiriĝis el la Movado»: «Tiam okazis, ke mi travivis nervkolapson — mia kariero, okazinta dum nur du jaroj estis tre rapida por mia psiko». Meditinda teksto por junaj gvidantoj!

En BUDAPESTA INFORMILO (jan 78) Antal Münnich per artikolo titolita: «ESPERANTO: ĉu lingvo de sekto aŭ lingvo internacia?» demandas sin, kial «en Hungarlando vivas ĉ. 20.000 esperantistoj, sed nur ĉ. 2.500 membroj de Hungara Esperanto-Asocio». He! Tia situacio ne estas unika pri Hungarlando! Kaj Iser Levin en ISRAELA ESPERANTISTO (n.º 61) pri «Esperanto naŭdekjara» koincide kvazaŭ alportas pripensojn al Antal Münnich: «Esperanto konkurencas kun la rusa lingvo kaj tio eble estas la kaŭzo, ke Stalin persekutis esperantistojn. Esperanto estis danĝera por la rusa lingvo, kiu estas necesa por la dominado* de la rusa popolo... La naciismo kreskas nun en Ukrainio, en la baltaj landoj kaj en satelitaj ŝtatoj. La popoloj sentas sin en duobla dependeco: politika kaj kultura. La kulturalan dependecon simbolas la rusa lingvo instruata en ĉiuj lernejoj de la soveta imperio».

En LITERATURA FOIRO (n.º 46) Bernard Golden metas la demandon: «Ĉu Zamen-

hof konis la turkan lingvon?». Pro la konata struktura parenceco de Esperanto «kun la familio de orientaj aglutinaj lingvoj» lia respondo estas plej interesa.

Fine en EHO (feb. 78 n.º I de la 50-a jaro) elstaras gravega debato; H. V. Rasmusen metas al la Estraro de Dana Esperanto-Asocio matematikan problemon: «ĉar la membronombro de DEA estis ĉ. 1.000 en 1959 kaj 465 en 1977, la asocio perdis nete ĉiujare meze ĉ. 30 membrojn, kio signifas, ke je daŭrigo de tiu tendenco ĉiuj membroj estos for post ĉ. 16 jaroj, kaj ke sekve en 1993 DEA ne plu ekzistos». Al kio replikas la Estraro: «Dum la venonta ĝenerala kunveno ni devas elekti prezidanton kaj 3 estraranojn (el 7 membroj). La prezidanto jam antaŭ longe deklaris, ke li ne estas reelektebla, kaj la 3 estraranoj ankaŭ pretas forlasi la postenojn». Nu, por atendi la solvon de tia problemo, en la «Lingva Angulo» de la sama numero elstaras ankaŭ laŭdire grava debato; divenu pri kia temo. Jen! Pri la nepra bezono de komunsekxa pronomo! Elstara harfendado, ĉu ne? en kiu partoprenas Bormann!

J. T.

* dominado = superregado — unu plia neologismo, kiun facilanime oni atribuos al la okcidentaj esperantistoj!

KION VI NE LEGOS ALILOKE

4.03.1978

Al la redaktoro de «Esperanto»,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam.

ĜENERALIGI LA JAMAĴN ATINGOJN

Sinjoro Redaktoro,

La baza koncepto kaj nombro da unuopaj asertoj en la februara ĉefartikolo (p. 21) estas kontestindaj kaj el historia kaj el perspektiva vidpunktoj. Ĉi tie mi limigas min sole al du, kiuj rekte koncernas la estrarojn antaŭ julio 1974 kaj, aparte, min persone:

1. La aserto «ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio» kontraŭas al la fakta situacio. Efektive, en sia tuta historio UEA neniam spertis tian neflekseblecon kaj foreston de unueco, kiel en la periodo komenciĝinta la 27-an de julio 1974. Observante la prudentajn kaj vere flekseblajn regulojn de la Statuto, la antaŭhamburgaj estraroj kaj komitatoj ia estis sukcesintaj krei modernan, prestiĝan kaj maksimume unuecan Asocion. La bedaŭrindaj eventoj kondukintaj al la kruda malobservado de la Statuto en Hamburgo kaj post ĝi ne nur rilate la bazan principon de partipolitika neŭtraleco (art. 4 kaj 13), sed ankaŭ rilate aliajn regulojn — ĉio abunde pruvita en *Hamburgo en Retrospektivo* — ne povis ne fremdigi tre grandan nombron da membroj, disrompi la unuecon kaj kaŭzi paralelan rigidecon kun kreskantaj negativaj sekvoj. Unu el la multaj estas, ke en nuraj tri jaroj UEA perdis nete 2.048 membrojn, el kio 1.284 individuajn (ĉ. unu kvinonon) kaj precize 100 ĉefdelegitojn kaj delegitojn. Similan senkuraĝigan bildon prezentas diversaj landaj asocioj, kiel ĉiu leganto povas mem konstati pri la propra.

2. La aserto, ke la «Asocio estas finance kaj administre solida, dank' al ŝparoj kaj plifortigoj de la pasintaj tri jaroj» implicate konformas al la trijara eksplicita endoktrinigo de la esperantistaro, ke kvazaŭe antaŭ tio la Asocio estis malforta. eĉ «bank-rotata» (!), kiel mi ie legis. Kontraŭ tia misprezento mi protestas kun indigno. La vero estas, ke dank' al bone planitaj, ĉiudirektaj kaj sukcesaj agadoj de UEA, la antaŭaj estraroj konsiderinde fortikigis la Asocion kaj finance kaj administre. Aldone al intelekta kapitalo, en la tempo de Hamburgo UEA havis ankaŭ solidan materian bazon. Ĝi proprietis tutan domon kun moderne ekipita oficejo en la centro de Rotterdam, dum ĝia financa kapitalo — la sole decida por taksu la financon forton de kiu ajn organizaĵo — estis kreskinta (en rondaj ciferoj) de 50.000 gld. en 1948 al 266.000 gld. en 1973, do pli ol kvinobliĝis. Tio okazis malgraŭ la neniel pravigebla kaj fakte neniam plene klarigita deficito de 1973, pri kiu respondecis la tiama kaj posta estrarano pri financoj, kaj pri kiu mi kiel tiama prezidanto estis eksplicite misgvidita, kio devigis min distanciĝi de la financa administrado por tiu jaro. (V. ĉap. 18.6 kaj 18.7 de *Esperanto en Perspektivo* kaj la Estraran Raporton por 1973/74, p-oj 39 kaj 66).

Prof. D-ro Ivo Lapenna

P.s.

Mi petas informi per du vortoj ĉu vi intencas publikigi la supran leteron.
Mi aldonas leteron, kiu estis adresita al mi persone, sed fakte rilatas al CED.



“Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo.”

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

«**ESPERANTO AŬ INTERLINGUA**» de Edo Bernasconi. 165 paĝoj. (29,50 cm. × 20,50 cm.) ne presita. Prezo 22,15 sv. Fr. Kolekto «**Studoj**» n.º 9 de Kultura Centro Esperantista.

La Chaux-de-Fonds (Svislando)

Se mi estus ĥirurgo, mi dirus ke Bernasconi sekcis traesplore ĝis la lasta histo la tutan korpon de Interlingua kaj Esperanto. Ĉu la ŝajne nova projekto valoras tiom da peno? En la praktiko mi preferas aplikadi «la konspiron per la silento» pro kiu kaj pri kiu plendas la novaj planlingvistoj; sed Bernasconi havas plene sciencan bazon kaj preferis kuraĝe sekci, skrapi kaj malmunti ĝis la lasta ero tiun latinan, malregulan kaj onidire tuj kompreneblan sintezafon, kiu en nia okcidenta mondanguleto povas ŝajni natureca.

Vanta, vana kaj maldemokrata pretendo estas la intenco trudi al la tuta mondo ian sintezan latinajon absolute fremdan al multaj popoloj, pretekstante ke ĝi spegulas la plej altajn kulturon kaj civilizicon! Ĉu do nur nia kulturo valoras? Aŭ ĉu la novaj projektoj celas nur ruinigi Esperanton? Ĉu ni estas fanatikaj ĉar ni ne volas cedi, enkorpiginte al ni tiagrade Esperanton, ke ni scias pensi kaj eĉ sonĝi en Esperanto, kaj parolas ĝin kiel propran lingvon?

Komparante ambaŭ lingvojn Bernasconi pravas, ke Esperanto havas radikojn ĉie: La Latino nutris grandan parton de ĝia leksiko, sed ĝia aglutineco, tiel karakteriza de la turka, estas azia. La rusa pravigas la tabelon de korelativoj, kaj la greka stampis Esperanton per sia «kaj» kaj la finoj oj, aj, ojn, ajn...

Bernasconi prezentas al ni monumentan verkon en dek-kvin ĉapitroj: 3-a, La Planita Lingvo, 4-a, La Problemo de Perfekta Lingvo, 7-a Kritiko pri Esperanto, 12-a, Planlingvistika Fatamorgano... Dek-kvin ĉapitroj abundaj je historiaj notoj, alilingvaj ekzemploj kaj instruaj komparoj.

Pri la lingva kvalito de la aŭtoro mi tuj diru ke ĝi estas klara kaj korekta; sed ĉu estas necese uzi preskaŭ laŭsisteme la novigojn «kvazaŭ mi perfortintus ion sanktan aŭ mi krimintus en alia» Pĝ 135. Ĉu estas necesa la ofta uzado de duoblaj prepozicioj, kiel «sendepende el-de la

eŭropaj lingvoj»? Pĝ 34. Estas ne necesa la prepoziciaĵo *far-de* post la participoj: «starigitaj *far-de*» Pĝ 41; «al la terminologio utiligita *far-de* Janton» Pĝ 35.

Kelkajn ne ĝustajn vortojn mi trovis: «La funkcio de *direkta* komplemento (rekta)»; «La *determina* artikolo (difina)» Pĝ 33; «formoj, kiuj aperas en *certaj* kuntekstoj (iaj, iuj, aŭ eĉ sen la maskita nedifina artikolo: «formoj, kiuj aperas en kuntekstoj» Pĝ 34; «utiligita» (uzita) Pĝ 35; «la korelativo-tabelo estas *anstataŭata* (anstataŭigata) Pĝ 49; «estas la transiro el-de verbo al ties *koresponda* (responda) verba substantivo.

La gerundio, ĉu aktiva, ĉu pasiva, finiĝas per E. «Dum la milito, perforte *silentigita*, Winter reellaboris siajn proponojn». Evidente ne la milito estis silentigita, sed Winter, la subjekto, kiu silentigite reellaboris Pĝ 128.

Estas esperinde, ke oni enkonsideros tiujn avertojn okaze de reeldono.

Tute prave Bernasconi listigis terminareton kun glosoj pri ne komunaj, fakaj vortoj, kiel Afektiva, Antonimo, Alomorfo, Falsifiki, Redundanco, Sintagmo k.m.a. kiujn ne profesiuloj ne komprenus. Sekvas 320 bibliografiaj notoj utilegaj al studemuloj.

Jen do grava, nepre posedota verko por koni ne nur la konsiston de la proponata latinida projekto, sed ankaŭ la internajn «organojn» de nia vivanta Esperanto.

Salvador Gumá

MULTATULI.

Tiu vorto estas Latina frazo (multa tuli), kiu signifas «mi elportis (eltenis, suferis) multon». Ĝi estas pseŭdonimo por Eduard Douwes Dekker, kies romano «Max Havelaar aŭ la kafo-aŭkcioj de la Nederlanda Komerca Societo» estas granda kontribuado de Nederlando al la mond literaturo de la dek-naŭa jarcento. Tiu romano estas intime ligita al la vivo de sia aŭtoro. Multatuli estis dum 17 jaroj ŝtata oficisto en la Nederlanda kolonia servo. Li fariĝis regionestro sur la Indonezia insulo Javo, kaj kion li spertis tie, eniris en lian romanon: Li priskribas la ekspluatadon kaj la maljustaĵojn de la tiama kolonia administrado. Ne estas troigite, se oni diras, ke tiu romano ĉe sia unua apero

(1860) skuis tutan Eŭropon. Ĝia intereso baziĝas sur ĝia laŭverece, sur ĝia realismo, sed kio faras ĝin agrabla legaĵo estas ĝia akra, kolera kaj furioza humoro. Tiu speguliĝas ekzemple en la nesuperebla kontrasto inter la justecama titola persono kaj la kafo-makleristo Droogstoppel, nerezisteble komika filistro. Krome estas ankaŭ rakontita la emocia historio de Saidja kaj Adinda, indiĝenaj amantoj, kiuj estas senkompatate pereigitaj per la avido de samlandanaj Javanestroj.

Bedaŭrinde, kiel nin asertas Wouter F. Pilger, Esperanta eldono de «Max Haveelaar» ŝajnas neebla sub la nunaj ekonomiaj kondiĉoj. Li do publikigis maldikan broŝureton, en kiu li aranĝis aparte tipajn teksterojn de Multatuli (rakontoj, parabolaj historioj, fabeloj, ekzemploj el la sep-volumaj «Ideoj» kaj serion de aforismoj). Estas ja ne la unua fojo, ke Multatuli aperas en Esperantujo, sed la ĝis nun aperintaj tradukoj el lia verkaro estas plejparte perditaj en malnovaj revuoj. Estas do trafa ideo renovigi la memoron pri Multatuli inter la esperantistaro kaj publikigi libron sub la titolo RIBELA SAGO, kiu substrekas la aktualecon de la aŭtoro kaj montras lin kiel nelacigeblan batalanton por sendependa pensado, kiel kontraŭulon de antaŭjuĝoj kaj de nepravigitaj aŭtoritatoj.

(*Multatuli, Ribela Saĝo, paraboloj — rakontoj — aforismoj, el la Nederlanda tradukis Wouter F. Pilger, 1977 Vulpo-Libro; 36 paĝoj, modela lingvo, bona papero, klara preso.*)

R. S., D-Mindeno

FRITHJOF-SAGAO de Esaias Tegnér, el la Sveda lingvo tradukita de Wilhelm Theodor Oeste (I-Ascoli Piceno 1976, Eldono Gabrielli).

Tio ja estas vera donaco al la instruituloj el la tutmonda Esperantistaro, al ĉiu unuopa Esperantisto, kiu interesiĝas pri monda literaturo, pri monda beletro kaj ankaŭ pri ĝia esplorado kaj pristudo. Vilhelmo Teodoro Oeste, al kiu ni jam ŝuldas tian instruan libron kiel lian por germanlingvanoj skribitan «Esperanto / Mittler der Weltliteratur», fariĝas per lia lasta verko denove mem perulo de mondliteraturo. Li esperantigis la tutan FRITHJOF-SAGAON de Esaias Tegnér kaj aperigis sian tradukon ĉe la ne nur pro tiu eldono meritplena eldonejo «Edizioni Gabrielli».

La libro estas dulingva. Sur la maldekstra paĝo troviĝas la sveda originalo, kiu estiĝis dum la jaroj 1818-1825, sur la dekstra la Esperanta teksto. Tiu konfrontado permesas kontrolan komparon inter ambaŭ tekstoj, kaj ĝi videbligas al tiu, kiu la svedan lingvon ne posedas, almenaŭ la frapantan identecon de la poeziaj formoj. Doktorino Lina Gabrielli, la eldonistino, skribis mem mallongan antaŭparolon pri la historio de la manuskripto ĝis ĝia fina publikigo, kaj Vilhelmo Teodoro Oeste

provizis la libron kun kvinpaĝa enkonduko, skribita jam en 1950 (!). Sekvas proksimume egallonga enkonduko de Tegnér kaj, por Svedlingvanoj, la bazaj reguloj de Esperanto. Ideon pri la aspekto de la poeto peras ilustraĵo de lia busto el la jaro 1829.

Oni ne scias, kion oni pli admiru, la flekseblecon de la Internacia Lingvo aŭ la formigan talenton de la tradukisto, kiu per ĉi tiu laboro ja pruviĝas vera poeto. Certe, sen iaj poeziaj licencoj Oeste eĉ ne en Esperanto povus atingi la intencitan celon. Kiu tute ne amas oftan elizion de la fina vokalo — o aŭ ankaŭ de la adverba finaĵo — e aŭ kiu abomenas la anstataŭigon de la plenaj participaj formoj per adjektivoj, kiel ekzemple tremanta, manka (mankanta), morda (mordanta), sida (sidanta), tiu plej bone lasu siajn fingrojn de ĉi tiu libro aŭ... provu mem tian formfidelan tradukon de la sagaa poeziciklo.

Pri kio temas? En dudek-kvar romanoj Tegnér renovigis praan islandan saĝaon el la 13a jarcento pri Frithjof, la heroo. Tiu estas forta, libera filo de riĉa kampulo. Li aspiras la reĝfilinon kiel edzinon kaj gajnas ŝin. Tegnér transformis la sangplenan, malmildan realismon de la antikva sagao laŭ la idealo de sia epoko en humanecan romantikan lirikan eposon. Sentigas la influoj de Silero kaj Kanto. Frithjof akiras sian edzinon ne plu per nura fizika forto, per batalema heroeco, sed per sia pasio superanta memdisciplino, kiu plinobligas lin kaj ebligas al li spiritan respondecon kaj liberecon.

Goeto varmege salutis la aperon de tiu verko, kiu, tradukita en preskaŭ ĉiujn Europajn lingvojn, estiĝis unu el la unuaj ekzempleroj de vera mondliteraturo. Ĝia fina Esperantigo estas grava okazo en nia literaturo, ĝi virtuoze reprezentas la plej ofte klasikajn versformojn de la originalo kun iliaj ŝanĝigantaj animstatoj.

R. S.

OLIVIER TZAÛT, disko, 26 sfr, kontraŭ antaŭpago al la ĝirkonto Olivier Tzaüt, Belevue 20, CH - 2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando, pĉk. 23-3656 LA Chaux-de-Fonds.

Ofte ni ne scias kion donaci je naskiĝtago aŭ je aliaj okazaĵoj al niaj geamikoj, familianoj aŭ eĉ al ni mem.

Jen estas taŭga objekto, kiu ĝojigas certe multajn korojn de junaj kaj maljunaj homoj, la disko «Tra L'Mondo» de Olivier Tzaüt. Li prezentas al ni dekdu popolkantojn el diversaj landoj en Esperanto. La tradukinto estas Claude Piron, la aranĝinto Roby Seidel.

Estas ĝuo aŭdi la molan, klaran voĉon de la kantisto, akompanata de diversaj instrumentoj, ĉiam konvenaj al la karaktero de la kanto. La tuto estas aranĝita sur du flankoj de grandformata sterea disko kaj plenumas la plej altkvalitajn pretendojn de la nuntempo.

Krome en Esperanto la disko jam ape-

ris en la franca kaj oni pretigas aliajn tradukojn en la germana, itala, angla kaj japana lingvoj. Tio estas nova instigo por mendi la diskon!

H. Mü.

LA KONTO-KARTO. Eld. Mondkomerca Eldonejo Esperantista, Poŝtkesteto 25041, NL-3001 HA Rotterdam (Nederlando), 1977.

Duflanke presita, nigre sur blanka fortika papero, 27,5 × 21,5 cm., la konto-karto

estas destinita por librotenado de aŭ persona aŭ nepersona konto, ĝi estas taŭga por loka societo, malgranda entrepreno, kongreso, ktp.

La konto-kartoj estas livereblaj kontraŭ antaŭpagitaj mendoj en la kvantoj: pakaĵo de 10 kartoj: 4 irpk-oj aŭ 3,25 guld., pakaĵo de 35 kartoj: 11 irpk-oj aŭ 8,50 guld.

Aliaj kvantoj, kaj mendoj ne antaŭpagitaj, laŭ interkonsento. Petu informojn ĉe la eldonejo, kaj ankaŭ pri la antaŭa eldonaĵo «La Internacia Kvitanclibreto».

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

18-a ALVOKO

Dezirante reokazigi la glorajn INTERNACIAJN FLORAJN LUDOJN, kiuj tiel solene okazadis 17-foje en diversaj urboj de Katalunujo, la Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio invitas, post 42-jara ĉeso, la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkuri noble per siaj verkoj en tiu tradicia Beletra Festo kiu, en la trobadora epoko, estiĝis en Tuluzo (Okcitanujo) kaj poste firme enradikiĝis en Katalunujo, kie ankoraŭ nun ĝi vigle persistas, kaj kie unuafoje ĝi eniris en la Esperantan Movadon kiel brila programero de la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelona.

Estos aljuĝitaj la jenaj PREMIOJ:

POEZIA BRANCO

- 1.— NATURA FLORO, al la plej bona ama poemo. (Maksimume 80-versa).
- 2.— JASMENO, al la plej bona priesperantisma poemo. (Maksimume 80-versa).
- 3.— VIOLO, al la plej bona humanisma aŭ etika poemo. (Maksimume 80-versa).

PROZA BRANCO

PREMIO al la plej bona prozaĵo - rakonto, novelo, eseeto. (Maksimume 2000-3000 vorta).

TRADUKA BRANCO

PREMIO al la plej bona traduko el la kataluna, de la noveleto verkita de Pere CALDERS «O ell, o jo», kiu troviĝas, i.a., en la libro «Cròniques de la veritat oculta» (Biblioteca Selecta, volumo n.º 170). Tiu kiu deziras havigi al si la tekston, bonvolu peti ĝin al S-ro Salvador Arago, str. Bassegoda, 40, 3-1, Barcelona-28.

La Juĝkomisiono aljuĝos, se eble, subpremiojn. — Ĉiu konkursanto bonvolu priatenti la jenan

REGULARON

- 1.— La verkojn oni sendu, po 4 ekzempleroj nepre tajpitaj je duobla interspaco, nur ĝis la 30-a de junio nunjara laŭ la poŝtstampo, al jenaj nomo kaj adreso de la Sekretario: Gabriel MORA i ARANA. Str. Carrió, 5, 4. MANRESA (Barcelona) Hispanujo.
- 2.— Ne rajtas konkursi tiuj verkoj antaŭe premiitaj aŭ publikigitaj.
- 3.— La aŭtoroj ne devas subskribi siajn konkursaĵojn, sed, krom la titolo, ili devas skribi specifan moton aŭ devizon. — Ili enmetu slipon kun siaj nomo kaj adreso en apartan fermitan koverton sur kiu estu skribita la titolo, moto aŭ devizo de la elektita branĉo.
- 4.— Kvankam oni devas konsideri ke ĉiu aljuĝota Premio estos, esence, honora, ĉiu gajninto ricevos, krom Diplomo, valoran esperantan libron aŭ mondonacon, laŭ ebleco.
- 5.— La Sekretario antaŭsciigos al la ĵus premiitoj la verdikton por ke ili povu ĉeesti la Feston aŭ, male, elekti siajn anstataŭantojn (precipe la gajninto de la Natura Floro).
- 6.— La gajninto de la NF simbole oferdonos ĝin al la Reĝino de l' Poetoj.

Sabadell - 1978.

DONACIOJ POR «HORIZONTO» — 1977

Gismuna sumo	37.872 ptoj.
F-ino Lemonnier, Vanves (Francujo) ...	135 »
F. M. Jelenc, Chatellerault (Francujo) ...	135 »
M. Crochet, Epernay (Francujo)	270 »
S-ino Thierry, Paris (Francujo)	2.747 »
O.K.K. de la 3-a Internacia Konferenco, Humblebaek (Danlando)	25.000 »

= 66.159 »

DONACIOJ POR «HORIZONTO» — 1978

Richard Schulz, Minden (Germanujo) ...	500 ptoj.
Jaime Pararnau, Tarrasa (Hispanujo) ...	1.000 »
Salvador Gumá, Reus (Hispanujo)	900 »
Franz Liebl, Fauerbach (Germanujo) ...	900 »
Maurice Crochet, Epernay (Francujo) ...	125 »
Carlos I. de Jesús, Raynhan (Usono) ...	500 »

3.525 »

ESPERANTO EN RADIO

Generalaj informoj pri diversaj disaŭdigoj en Esperanto. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich.

Pola Radio — Ĉiutage

05.00-05.30 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz), 41.27 m (7270 kHz).

15.30-16.00 Varsovio, 41.99 m (7145 kHz), 31.45 m (9540 kHz), 31.01 m (9675 kHz).

21.30-22.00 Varsovio, 200 m (1502 kHz), 50.04 m (5995 kHz), 48.90 m (6135 kHz).

Pola Radio, Esperanto-Redakcio Poŝtkesto 46, P1-00950 Warszawa, Pollando.

Radio Roma — Dimanĉe

20.00-20.20 Romo, 49.92 m (6010 kHz), 41.24 m (7275 kHz), 41.15 m (7290 kHz).

Radio Roma, Esperanto-Fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

Svisa Kurtonda Radio — Ses tagoj semajne

Lunde, Merkrede kaj Vendrede je 13.20 - 13.30 kaj Marde, Ĵaŭde kaj Sabate je 22.35 - 22.45 mezeŭropa tempo. Por la tempo de Greenwich unu horon pli frue.

Radio Vatikana — Dimanĉe

Mezlonga ondo (ĉiudirekten: kHz 1529) kaj sur la kurtondoj: kHz 6190, 7250 kaj 9645, en la direkto de Eŭropo. kHz 9625, 11705 kaj 15120 en la direkto su Afriko. Radio Vaticana, Esperanto-redakcio, 00120 Città del Vaticano.

Radio Vieno — Sabate, Dimanĉe

16.45-16.55, sabate, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 16.87 m (17.780 kHz).

05.45-05.55, dimanĉe, Vieno, 48.74 m (6155 kHz), 41.64 m (7205 kHz), 16.85 m (17.800 kHz).

Esperanto-Redakcio de ORF, P.O. Box 700, A-1041 Wien, Austria.

Radio Zagreb — Vendrede

23.05-23.20, Zagrebo, 264 m (1163 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-Fako, Jugoslavia.

Radio Sabadell — Merkrede

21.00-21.15, Sabadell, 203 m (1475 kHz). Radio EAJ 20, Sabadell, Hispanujo.

Radio la Voz de Valencia — Vendrede

23.00-23.15, Valencio, 358 m (836 kHz), La Voz de Valencia, Hispanujo.

Radio Clube de Sorocaba — Lunde

00.00-01.00, Sorocaba, 278 m (1080 kHz). Radio Clube de Sorocaba, rua São Bento 190, BR-18100 Sorocaba, Brazilo.

Radio Pekino — Dimanĉe, Vendrede, Sabate

11.00-11.30, dimanĉe, Pekino, 47 m, 40 m, 30 m.

12.30-13.00, Pekino, 30 m, 25 m, 19 m.

20.00-20.30, vendrede, Pekino, 43 m, 33 m, 31 m, 25 m.

11.00-11.30, sabate, Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00, Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30, Pekino, kiel vendrede. Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Pop. Resp. Cinio.

LA INGENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono «Fundación Esperanto» de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fako) Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5 × 25 cm, ilustrita, bindita. Prezo: 2.000 pesetoj plus 10 % por sendokostoj.

Havebla ĉe F. E. Sekr. Inés Gastón, P.º Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza-I, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

IV.a INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Okazonta en Jaca, Hispanujo, de la 22.^a ĝis la 29.^a de Julio 1978

Sub la aŭspicioj de la Universitato de Zaragoza

Korespondadreso:

I. Gastón. P.^o Marina Moreno, 35, 4.^o
Zaragoza-1. Hispanujo

Konferenĉejo:

Palaco de Kongresoj kaj Ekspozicioj

PROVIZORA PROGRAMO

- Sabaton:** *Matene:* Malfermo de la Akceptejo — Inaŭguro de la Kurso de Esperanto.
Posttagmeze, Laborkunsido: Akcepto de la Regularo pri la Internaciaj Konferencoj de NEM kaj organizaj demandoj («Horizonto», reprezentigo k.a.).
Vespere, «Interkona Vespere».
- Dimanĉon:** *Matene,* Solena Malfermo kaj elekto de la Prezidentaro de la Konferenco. Kiel anoncote, tiu ĉi solenaĵo okazos en la Cefsalono de la Urbodomo, sub prezido de la Urbestro de Jaca kaj Universitataj Aŭtoritatoj. Faros la Inaŭguran Paroladon Prof. D-ro Ivo Lapenna «Neŭtraleco kaj Humaneco».
Posttagmeze, Komenco de la prelegserio: *Eŭropo hodiaŭ — Kulturaj kaj Politikaj aspektoj.* Prelegos Prof. D-ro Ivo Lapenna, Universitato de Londono. Enkonduko pri la ĉeftemo sub titolo: «La Politika kaj Lingva Mapo de Eŭropo — Aktuala kaj Potenciala Roloj de la Internacia Lingvo».
D-ro Paul Neergaard, Instituto de Sempatologio por Evolulandoj, Kopenhago. «Eŭropo kaj la Tria Mondo».
D-ro Oton Pancer, Universitato de Zagreb, «Raciigo de la laboro en la Agrokulturo de Eŭropo».
D-ro Juan Régulo, Universitato de La Laguna (Tenerife). «Kontribuo de Hispanujo al la Eŭropa Kulturo».
S-ro Jean Thierry, Instruisto, Parizo. «Cefverkoj de la Eŭropa Literatura en la Internacia Lingvo».
(Ĉiu prelego daŭros proksimume 45 minutojn kun posta 15-minuta diskuto; sekve, parto el la prelegoj okazos lundon matene.)
Vespere, Koncerto, Orkestro de «Cámara» de Zaragoza.
- Lundon:** *Matene,* daŭrigo de la prelegserio kaj ĝenerala diskuto pri Eŭropo kaj niaj eventualaj agadeblecoj.
Posttagmeze, Jara Kunveno de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.
Vespere, Prelegoj pri *Neŭtraleco kaj Neŭtralismo.* Prelegos Prof. d-ro Ivo Lapenna pri «La Koncepto de Neŭtraleco en Internaciaj Rilatoj kaj Internacia Juro».
S-ro Jean Thierry pri «La Principo de Neŭtraleco en la Esperanto-Movado: Historia Trarigardo kaj la Nuna Stato».
- Mardon:** *Matene* kaj, se necese *posttagmeze,* Ĝenerala diskuto pri neŭtraleco kaj la pozicio de NEM.
Vespere, Amika renkontiĝo kun Prof. Ivo Lapenna okaze de lia 50-jara esperantisteco. — Je la 22-a Komuna Vespermanĝo kaj Folkloro Aragona Prezentado.
Prof. Miguel Sancho-Izquierdo prezentos la aragona folkloron per mallonga parolado pri «La Jota kaj nia Aragona Sento».
- Merkredon:** *Matene,* Ĝenerala Kunveno: Diskuto pri organizaj demandoj de NEM.
Posttagmeze, ekskurso al «San Juan de la Peña».
- Ĵaŭdon:** *Matene,* Kunveno de la membroj de la Akademio, kiuj ĉeestos la Konferencon. — Vizito al la Internacia Universitato.
Posttagmeze, ĉu libera, ĉu ekskurso al Hecho-Siresa-Oza.
- Vendredon:** *Matene,* Ĝenerala Kunveno: Pridiskuto kaj akcepto de la Rezolucio de la Konferenco. — *Tagmeze,* Fermo.
- Sabaton:** Tuttaga ekskurso al «Ordesa» (Nacia Parko).

Atentigo: Ĉiuj matenaj sesioj komenciĝos je la 9,30 kaj finiĝos tagmeze; la posttagmaj sesioj komenciĝos je la 15-a.

Kiel anoncote en antaŭa numero, dum la Konferenco okazos Internacia Elementa Kurso de Esperanto por neesperantistaj instruistoj. Pri la horaro ni informos aparte.

Ankaŭ okazos gvidata vizito al kulturaj institucioj de Jaca. Pri la horaro de tiuj vizitoj, same kiel pri aliaj distraj eroj ni informos aparte.